

# IL POPOLO CINIO


中國報道

6

1985







*Bonaj amiketoj* Foto de ĈJU ŬEJBO



## Enhavo

### Eduko: Iom pri la elementa eduko de Ĉinio

Por ĉiuflanka disvolviĝo de la element-lernejoj . . . . .	2
Kiel mi plenumas la ĉefinstruistan devon . . . . .	5
Interesa instruado . . . . .	8
Edeno de infanoj . . . . .	10

### Por la 35-jara jubileo de EPCĉ:

Gratulaj leteroj el Jugoslavio . . . . .	24
Ĉiam amike kaj samideane . . . . .	25
Pensoj pri 35 jaroj de El Popola Ĉinio, kaj pri "profito" . . . . .	26

### Esperanto:

Esperanto en Junnan-provinco . . . . .	27
Mia patrino . . . . .	47
Esp-novaĵoj . . . . .	29

### Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (6): Nord-tibeta stepo . . . . .

Malfermitaj urboj: Naturdotita haveno Ljanjungang ĉe la Flava Maro . . . . .	16
--	----

Komercio: En la manĝaĵ-foiro de Tjanĝin . . . . .	20
---	----

### Socio:

La unua gazeto eldonata de ĉinaj geknaboj . . . . .	40
Vivo de ĉinaj infanoj . . . . .	43

Poemo: Rigardi malproksimen . . . . .	47
---------------------------------------	----

Nunaj ĉinoj: La kreinto de argilaj homfiguroj animitaj . . . . .	67
--	----

Arkeologio: Fosilia simi-homo antaŭ 200 000 jaroj . . . . .	57
---	----

Vojaĝo tra Ĉinio: Kantono — fenestro de suda Ĉinio . . . . .	31
--	----

### Fotoj faritaj de E-istoj:

En suda Ĉeĥoslovakio . . . . .	36
Sunsubiro en la brazila internlando . . . . .	36

Enciklopedieto de Ĉinio: Raraj plantoj de Ĉinio . . . . .	59
---	----

Por via sano: Protekto de oreloj, nazo, okuloj kaj lipoj per masaĝo . . . . .	62
---	----

Internacia problemo: "Depresio" kaj "reprosperiĝo" de la Okcidenta Eŭropo . . . . .	63
---	----

Ĉinlingva kurso . . . . .	46
---------------------------	----

Inter ni . . . . .	61
--------------------	----

Kurantaj aferoj . . . . .	48
---------------------------	----

Sur la kovrilo: Patrino kaj filo	Foto de GOŬ LIJU
Interne de la kovrilo: Bonaj amiketoj	Foto de ĈJU ŬEJBO
Sur la dorskovrilo kaj interne de ĝi: Argilaj skulptaĵoj faritaj de Ĝang Ĵunzi	Foto de LAŬ BAJ

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00		
Aŭstralio	\$A	9.00	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	US\$	10.00	
Britio	£	5.00	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00		Can\$	10.00	
			Italio	Lit	11 000.00	Portugaliao	Esc.	700.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$	4.00



# IOM PRI LA ELEMENTA EDUKO DE ĈINIO

*Iuj legantoj skribis al ni, ke ni raportu, kiel la ĉinaj element-lernejoj estas edukataj. En la komenco ĉi-jare du el niaj raportistoj vizitis iujn elementajn lernejojn de Pekino kaj petis du spertajn instruistojn verki jenajn artikolojn. Kvankam la elementaj lernejoj havas eble diferencajn instru-metodojn, tamen iliaj celoj estas samaj. Ni esperas, ke tiuj artikoloj povos iom konigi al niaj legantoj la elementan edukon de Ĉinio.*

— La Red.

## Por ĉiuflanka disvolviĝo de la element-lernejoj

de ĜANG ŜAN\*

Nia Pekina Dua Eksperimenta Elementa Lernejo havas 24 grupojn de 6-jara lerno-periodo, pli ol 60 instruistojn kaj pli ol 1 100 lernantojn.

Nia lernejo donas grandan atenton al enoficigo kaj kulturado de instruistoj, el kiuj triono diplomitiĝis el universitatoj kaj la ceteraj estas eminentaj diplomitoj de instruistaj lernejoj. Ĝi metis al la instruistoj rigorajn postulojn en ideologio, konduto, sinteno

kaj vestado, por ke ili fariĝu mentoroj de la lernantoj.

Nia lernejo tre zorgas pri la infanoj en ilia ĉiuflanka progreso kaj faras ĉion por kulturi ilin en homojn amantajn la patrolandon, popolon, sciencan, laboron kaj publikan poŝedaĵon. Kun la postuloj en la "Principoj Observendaj por Element-lernejoj" ellaboritaj de la ŝtato kiel temo, ni disvolvis aktivadon por ora pokaŭlo, dank' al kio en nia lernejo fu-

roris moro diligente lerni kaj multe fari bonajn aferojn.

Same kiel la aliaj elementaj lernejoj en Ĉinio, nia lernejo uzas la lernolibrojn kompilitajn de la ŝtato kaj donas lecionojn de la ĉina lingvo, matematiko, historio, geografio, komunaj scioj, ideologio kaj moralo, manlaboro, fizika kulturo, muziko, pentrado kaj ortografio laŭ la difino de la 6-jara instrua plano de la Eduka Ministerio de Ĉinio.





*La aŭtoro*



*Instruistinoj diskutas pri eduka reformado.*

En la instruado ni dediĉas grandan atenton al kulturado de lerno-kapablo kaj lerno-kutimo de la lernantoj kaj al solidigo de iliaj fundamentaj scioj. Ekz., en la ĉinlingva instruado ni tre atentigas ilian konadon kaj skribadon de ideogramoj kaj voĉlegadon, por ke la lernantoj posedu la regulojn pri la strukturo de la ideogramoj, iliaj aranĝo kaj strekordo kaj la difinojn pri la spaceto inter ideogramoj kaj tiu inter linioj; en matematika instruado ni kulturigas ilian kapablon de buŝa kaj skriba kalkulo, ekzamenoj kaj solvo de problemoj; en muzika instruado ni emfazas partituran konon kaj son-produktan ekzercon; en geografia instruado ni levigas ilian kapablon koni kaj desegni mapojn. Per tio la lernejo havigas al la geknaboj solidajn fundamentajn sciojn por meti firman bazon por ilia posta lernado.


En la lastaj jaroj, puŝate de la kampanjo por reformo de administra sistemo tra la tuta lando, ankaŭ nia lernejo faris ian provadon en la instruado. Ni celas ŝanĝi la tradician instru-metodon "instruistoj instruas kaj lernantoj lernas" en tiun "ellernigi la lernantojn", t. e. evolvi la inteligentecon de lernantoj dum la instruado. Ekz., en matematika instruado la lernejo donas penso-ekzercan lecionon, t.e. lecionon

de amuza matematiko, por ekzerci la lernantojn en vigla pensado; en la ĉinlingva instruado ni levigas ilian kapablon de pensado, ekz., en instruado de ideogramoj al la unuaklasaj lernantoj, laŭ la leĝo de ideogramoj kaj tiu de la infana konado ni instruas unue sol-elementajn ideogramojn, poste kunmetitajn kaj pli poste vortojn, vort-grupojn el ĵus lernitaj kunmetitaj ideogramoj. La lernantoj povas fari kunmetitan ideogramon "会" el sol-elementaj ideogramoj "人" kaj "云" kaj poste pli ol 30 vortojn kaj vort-grupojn. Tio profundigas la komprenon de lernantoj pri kunmetitaj ideogramoj, kulturigas ilian asociatan pensadon kaj riĉigas la


vortaron posedatan de ili. Tio metas bazon por ilia verkado de artikoloj en la estonteco. Aŭskultinte tiujn lecionojn, iu sveda edukisto diris: "Tiamaniere elkulturitaj infanoj scias kaj amas lerni. Tia eduko certe elkulturos eminentajn lernantojn diligentajn kaj ĉiuflanke disvolviĝantajn."

Ĉe la ekvizito de elementa lernejo la infanoj eniris en gravan turnopunkton. Ilia ĉefa aktivado transiras de ludo al lernado. La transiro devas favori ilian korpan kaj mensan kreskadon, por ke ili alkiutimiĝu al la lerneja vivo, amu lernadon kaj sane disvolviĝu en fizika kaj mensa flankoj. Nia lernejo tre atentigas esploron kaj eksperimenton pri la transira

*En kaligrafado*







*Fari okul-protektajn ekzercojn dum lecionopaŭzo*



*Lernantinoj faras papertondaĵojn.*

eduko kaj laŭeble reduktas lernohorojn kaj taskojn de la unuaklasaj lernantoj. La instruistoj donas al ili antaŭtagmeze tri lecionojn po 35 minutoj kaj ne superŝutas ilin per hejmtasko en la unuaj du monatoj. Ĉiumonate la unuaklasaj lernantoj havas du lecionojn de fizika kulturo kaj kvarfojajn eksterdomajn ludojn kaj ĉiutage okazon por libera aktivado post lernado. La instruistoj klopodas fari sian instruadon interesa, por ke la lernantoj ricevu sciojn en amuza ludo. Dank' al tio la infanoj rapide adaptiĝas al la lerneja vivo, ekŝatas siajn kursojn kaj ekamas la kolektivivan vivon kaj ankaŭ ilia korpo fortiĝas certagrade.

Nia lernejo organizis ĉ. 50 postlecionajn grupojn laŭ intere-

soj de la lernantoj, kaj ĉiun grupon gvidas instruisto kaj eksterlerneja helpanto, tiel plene disvolviĝis la kapablo de lernantoj. Tio estas rigardata kiel la dua kanalo por elkulturi ĉiuflanke disvolviĝantajn lernantojn. La malgranda ĥoro de nia lernejo jam dublis dekojn da filmoj kaj televidaj filmoj en kantado en la lastaj jaroj. Verkoj de la kaligrafia kaj pentra grupoj estis ekspozitaj en Pekino, Tokio kaj Novjorko. Krome, ankaŭ testaj papertondaĵoj kaj argilaj modlaĵoj estis donacitaj al eksterlandaj vizitantoj.

La sukcesoj de nia lernejo montriĝas ankaŭ en nia fina ekzameno kaj mezlernej-enira ekzameno. En la lastaj jaroj 50% de la lernantoj eniris en altnivelajn

mezlernejojn per pli ol 190 poentoj en la ĉinlingva kaj matematika ekzamenoj. Multaj mezlernejaj instruistoj diris, ke la lernantoj devenintaj de nia lernejo amas kaj scias lerni, viglas en pensado kaj kapablas fari eksperimenton. Tiuj lernantoj tamen diris, ke tion ili ŝuldas al siaj instruistoj de elementa lernejo, kiuj donis al ili bonan lerno-metodon kaj instruis al ili serioze lerni kaj labori.

\* *La aŭtoro estas vicestro de la Pekina Dua Eksperimenta Elementa Lernejo.*

### **PRINCIPOJ OBSERVENDAJ POR ELEMENT-LERNEJANOJ**

1. Amu la patrolandon, la popolon kaj la Komunistan Partion de Ĉinio. Lernu bone kaj progresu ĉiutage.
2. Akurate vizitu la lernejon, ne forestu for de leciono senkaŭze, absorbiĝu en leciono kaj serioze plenumu la hejmtaskojn.
3. Persistu en korpo-ekzercado kaj aktive partoprenu en postleciono aktivado.
4. Vivu higiene, vestiĝu bonorde kaj pure, ne kraĉu ĉie ajn.
5. Amu fizikan laboron kaj faru kion vi mem povas.
6. Vivu modeste, domaĝu gregon, estu ne elektemaj pri manĝaĵoj kaj vestoj kaj ne malŝparu monon.
7. Observu la disciplinojn de la lernejo kaj la sociordon.
8. Respektu la instruistojn, estu solidaraj kun la kamaradoj, bone konduku, ne insultu kaj ne interbatalu.
9. Zorgu pri la kolektivo, domaĝu la publikajn objektojn kaj transdonu al la lerneja instanco la perdaĵon de aliaj.
10. Estu fidelaj kaj kuraĝaj, ne mensogu, korektu ĉiajn erarojn.



# 6-jara Instrua Plano de Urbaj Elementaj Lernejoj

Klaso		1	2	3	4	5	6	Totala horaro de lecionoj	%	Komparo de 6 j. sistemo kun 5 j.
L e c i o n o	C i n a l i n g v o									
	Ideologio k moralo	1	1	1	1	1	1	204	41	+24
	Sumo	10	10	10	9	9	9	1938	39	+66
	Tekstoklarigo	8	8	7	6	6	6			
	Parolo	1	1							
	Verkado de artikolo			2	2	2	2			
	Skribado	1	1	1	1	1	1			
	Matematiko	5-6	5-6	6	6	6	6	1156—1124	23.3	+4 ĝis 72
	Fremda lingvo					3	3			
	Naturaj scioj			2	2	1	1	204	4.1	—12
	Geografiaj scioj					2		68	1.4	— 4
	Historiaj scioj						2	68	1.4	— 4
	Fizika kulturo	2	2	2-3	2-3	2-3	2-3	408—544	8.2	+48 ĝis 184
	Ludo	1	1					68	1.4	— 4
Muziko	2	2	2	2	2	2	408	8.2	+48	
Belarto	2	2	2	2	1	1	310	6.8	+52	
Fizika laboro				1	1	1	102	2.1	+30	
Lernobjektoj	7	7	7	8	9	9				
Totala semajna horaro	23- 24	23- 24	25- 26	25- 26	25- 26	25- 26	4964—5168			
A k t i v a d o	Memlernado	2	2	2	2	2	2			
	Sporto	2	2	2	2	2	2			
	Legado de teknikaj k literaturaj verkoj	3	3	3	3	3	3			
	Lerneja k klasa aktivado	1	1	2-1	2-1	2-1	2-1			
Horaro de semajna aktivado	31- 32	31- 32	34	34	34	34				
Kolektiva eduko	Ciujure du semajnoj									
Klarigo	La pocento kalkulita laŭ la totala leciono-dona horaro 4964 de 6 jaroj									



Gjang Gjingfen

Gjang Gjingfen kaj ŝiaj lernantoj



## Kiel mi plenumas la ĉefinstruistan devon

de ĜJANG ĜJINGFEN\*

**M**I estas instruistino de halingvo kaj ankaŭ ĉefinstruistino de la sesa klaso.

Laŭ la postuloj de nia lernejo, la ĉefinstruistoj devas fari la lernantojn moralaj kaj lernemaj, kun ĝustaj pozoj en legado, skribado, sidado kaj irado. Sed mi opinias, ke la ĉefinstruistoj devas kreskigi la lernantojn ĉiuflanke — morale, intelekto kaj korpe, por ke ili metu bonan fundamenton por ricevi mezgradan edukon en la estonteco.

Kiam mi eklaboris kiel ĉefinstruistino, mi pensis, ke la lernantoj de la sesa klaso baldaŭ diplomitiĝos de elementa lernejo kaj vizitos mezlernejon, mi devas klopodi, por ke ili, post ekzameno, eniru en bonan mezlernejon. Tial mi donis al ili multe da hejmtaskoj. Post nelonge plen-

dantoj venis al mi unu post alia. La muzika instruisto plendis, ke iuj lernantoj faras matematikajn ekzercojn en la muzika leciono; la instruisto de komunaj scioj plendis, ke iuj lernantoj en lia kurso verkas artikolon; kaj iuj lernantoj eĉ ne kuraĝis viziti la lernejon pro tio, ke ili ne plenumis siajn hejmtaskojn. Sed mi okupiĝis pri solvo de diversaj problemoj en laborhoroj kaj pri korektado de la ekzercoj de lernantoj en postlaboraj horoj. Mi konfesis, ke superŝuti ilin per ekzercoj kaj hejmtaskoj ne estas efika rimedo, sed tiam mi ne povis tuj trovi alian bonan rimedon. Ĝuste tiam, vortoj en taglibro de iu lernanto lumigis mian penson.

Li diris: “Mi ŝatas legi historiajn librojn. Ricevinte tian ra-

kontan libron, mi ĉiam tralegis ĝin unuspore. Se ĝi ne apartenis al mi, mi ĉiamaniere depruntis ĝin.” Ho, jes! Infanoj en tia aĝo ja ŝatas legi diversajn librojn. Mi pensis, ke se mi organizos ilin por legi iujn interesajn, enhave sanajn librojn, tio povos vekii ilian intereson por lernado kaj levi ilian kapablon de legado kaj nivelon de verkado. Tiel en la klaso komenciĝis aktivado por premii legadon de libroj kaj ĵurnaloj. Tiam mi ofte en dimanĉo iris al librejoj por aĉeti librojn, kiujn mi pruntedonis poste al miaj lernantoj. En instruado de verkado mi rekomendis al la lernantoj la libron “Mi Estas Usona Nigra Infano”, poste voĉlegis kaj analizis iujn el ĝiaj alineoj. Mi ankaŭ petis, ke ili rekomendu siaopinie plej bonajn librojn al la kunlernantoj. Tio rapide levis



entuziasmon de la lernantoj por legado kaj kondukis ilin sur ĝustan vojon. Post preparo de certa tempo, mi trifoje kunvokis la lernantojn al klaskunvenoj "Ami Patrolandon kaj Sciencon" por rekomendi bonajn librojn. En la kunvenoj la lernantoj per pentraĵoj, deklamoj kaj paroladoj rekomendis bonajn librojn kaj prezentis siajn postlegajn opiniojn. Rakontante pri la libro "Mi Estas Usona Nigra Infano", iu lernanto diris: "Kiel malfeliĉa estis la malgranda Jack! Lin batis kaj eksigis la mastro. Ni ricevas ne batojn, sed amon de niaj instruistoj kaj helpon de niaj kunlernantoj."

Post tio mi pli atentigas karakterizaĵojn de la lernantoj. Mi inspiras kaj edukas ilin en diversaj interesaj aktivadoj. Tiel fariĝas pli glata mia ĉefinstruista laboro.

Multaj el miaj lernantoj estas solinfanoj kun pli bonaj vivkondiĉoj kaj dorlotataj de siaj gepatroj. Tial mi edukas ilin, ke ili respektu pliaĝulojn, prizorgu junajn infanojn kaj amu laboron kaj kolektivon. En la lasta jaro ni invitis al nia klaso gepatrojn de iuj lernantoj. Antaŭ tio la lernantoj laŭ mia propono eksponis en la klasĉambro diversajn premiaĵojn, gajnitajn de iliaj geavoj, gepatroj, gefratoj kaj onkloj, kaj verkis artikolojn kun titolo "Persono lerninda por mi". Al la gastoj la lernantoj voĉlegis siajn artikolojn. Multaj gastoj estis tre kortuŝitaj, aŭskultinte la laŭdojn de la infanoj al ili. Tiuj, kiuj antaŭe nur sciis bone nutri kaj ornamu siajn infanojn, sentis sin hontaj, kaj diris, ke ili turnos sian atenton sur ilian psikologion. Senescepte en la mezo kaj fino de ĉiu semestro nia lernejo okazigas kunvenon de la gepatroj de la lernantoj por raporti al ili pri la eduka laboro de la lernejo

kaj la lernado, korp-laboro kaj korp-ekzercado de la lernantoj. Dank' al tio, multaj gepatroj povas aktive eduki la lernantojn, kunagante kun la lernejo.

Mi ofte organizis kolektivajn aktivadojn por lernantoj, ekz. piedpilkadon en la sportejo kaj stafetkuradon. Foje en malvarma tago la lernantoj ne nur aplaudis la konkursantojn, sed ankaŭ preparis por ili varman trinkakvon. La konkursejo estis plena de kolektiva amikeco.

Alfoje mi gvidis la lernantojn al la Okcidenta Monto de Pekino por pikniko. Tiun matenon la lernantoj gaje venis sur la monton, kun brulligno, legomoj kaj kuirpotoj. Komenciĝis la pikniko. Iu lernanto, tre bona en lernado, malsukcesis bruligi la hejtaĵon. Sed alia silentema lernanto, ne tre bona en lernado, lerte faris fajron kaj sukcese pretigis manĝaĵon kune kun aliaj lernantoj. Ili manĝis, ridis kaj babilis, sentante, ke por la kolektivo estas nemalhavebla ĉiu ĝia membro, kiu havas sian kapablon kaj sian mankon.

Kiel ĉefinstruistino, mi devas trakti multajn aferojn okazintajn inter la lernantoj, laŭdi bonajn lernantojn kaj bonajn agojn kaj kritiki malbonajn. Ĉar iuj aferoj estas simplaj kaj facile solveblaj, sed aliaj — kompleksaj, mi devas solvi ilin atente por atingi bonan edukan efikon. Foje iu junpioniro ne portis ruĝan koltukon laŭ la regularo de la lernejo. Tiutage okazis ĝuste lerneja aktivado. Alia lernanto volis pruntedoni unu al ŝi, sed ŝi ne akceptis. Tio makulis la gloron de la klaso. Poste ŝi diris, ke jam estas eraro ne porti la ruĝan koltukon kaj deprunti alies koltukon por akiri honoron signifas duobligi la eraron. Ĉu ŝi eraris? Ne! Kvankam ŝi eraris pro forgeso de la ruĝa koltuko, tamen ŝi tuj konfesis sian kulpon kaj ne volis duobligi ĝin. Tial mi laŭdis ŝin. De tiam ne nur ŝi, sed ankaŭ ŝiaj kunlernantoj firme tenis tiun lecionon en sia memoro por konscie defendi la honoron de la kolektivo.

Kiel ĉefinstruistino, mi devas zorgi ankaŭ la vivon de la lernantoj. La patrino de lernanto Jang

*Gjang Ĝingfen donas lecionon.*



Ŭenĝje longtempe kuŝis surlite pro paralizo. Ĉiumatene, antaŭ ol iri al la lernejo, li devis pretigi matenmanĝon por ŝi kaj meti termoson kaj litpelvon apud ŝian liton. Informiĝinte pri tio, mi ofte vizitis lian hejmon por helpi lin fari hejmlaboron. Krome, mi resanigis lin de pernio. Post tio, li kvazaŭ tuj maturiĝis. En la kolektiva aktivado ekster la lernejo li ĉiam memvole helpis siajn kunlernantojn.

Mia laboro estas tre bagatela kaj laciga. Krom plenumi la instruadon kaj aranĝi diversajn postlecionajn aktivadojn, mi ankaŭ helpas la lernantojn en matena memlernado, kontrolas la purecon de la klasĉambro, aranĝas interlecionan gimnastikan ekzercon, parolas kun lernantoj kaj vizitas iliajn familiojn. Sed, kiam mi kune kun la lernantoj promenis sur la Granda Muro kaj ĝuis la belan pejzaĝon de la norda lando, mi baniĝis en ĝojo

kiel la lernantoj. Kiam mi manĝis farĉitajn past-bulojn faritajn de mi kaj miaj lernantoj en la novjara kunveno, mi sentis varmon de la kolektivo. Kiam mi ludis korbopilkon kune kun lernantoj, mi sentis min multe pli juna. Kaj kiam mi vidis ilian progreson eĉ malgrandan, mi estis tre ĝoja kaj tuj mallaciĝis.

*\* La verkinto estas instruistino de la elementa lernejo Sangtoŭtĵajŭ en Ĉongŭen-distrikto, Pekino.*

## Interesa instruado

de ĜANG MEJĜI

**M**I ne scias, kiom da lecionoj mi jam vizitis de elementa lernejo ĝis altlernejo. Sed tia aritmetika leciono, kian instruistino He Ĝŭangĉin donis al la unuaklasanoj de la Pekina Dua Eksperimenta Elementa Lernejo, estis unuafoje vidita de mi.

Sonorilo eksonis la lecionon. Gajaj geknaboj tuj kvietiĝis. Ili ekstaris malantaŭ sia tablo kaj salutis ĥore la instruistinon, kiu ridete resalutis ilin.

Laŭ rutino instruisto ordonas, ke la lernantoj malfermu sian lernolibron kaj relernu la lastan

lecionon, aŭ li skribas sur la nigra tabulo novan enhavon. Sed instruistino He ne faris tion.

Ŝi kontrolis lernolibrojn kaj aliajn necesajn lernilojn sur la tabloj de la lernantoj, dirante: "Geknaboj, vi estas saĝaj, ĉar vi ĉiuj havas po kvar trezorojn. Ĉu

*Instruistino He Ĝŭangĉin donas al unuaklasanoj amuzan aritmetikan lecionon.*








*La lernantoj faras diversajn triangulojn per bastonetoj.*

vi ankoraŭ memoras, kio ili estas?" La knaboj alte eklevis sian maneton. La instruistino vokis knabon kun grandaj okuloj. Li leviĝis kaj respondis: "Oreloj." Poste aliaj du knabinoj aldonis "Buŝo, okuloj kaj cerbo." La instruistino ekridetis: "Vi prave respondis. Hodiaŭ mi donos al vi alian trezoron, t.e. manojn. Saĝa knabo lerte uzas siajn okulojn, buŝon, orelojn, cerbon kaj manojn. Ĉu vi opinias tion prava?" La knaboj kapjesis kaj laŭte diris: "Jes."

La instruistino funkciigis lumbildan projekciatoron sur la podio kaj sur ekrano tuj aperis bildo de kokoj kaj anasoj intermiksitaj. Ŝi diris: "Patrino-kokino kaj patrino-anasino promenas kun siaj idoj. Kiu povas sciigi al mi, kiom da kokidoj kaj anasidoj estas?" 48 geknaboj kun larĝe malfermitaj okuloj fiksas sian rigardon sur la bildo kaj silente kalkulis. "Ve, mi denove miskalkulis," grumblis iu knabo. Jen li levis sian manon, sed lia respondo estis malĝusta. Tiutempe plejparto de la lernantoj jam levis



*Argilaj homfiguroj skulptitaj kun la titolo: Ni Amas Maron.*

sian manon. Iu knabino ne nur ĝuste eldiris la nombron, sed eĉ la diferencon inter koko kaj anaso. Ankaŭ alia knabo respondis ĝuste. Li diris, ke li kalkulis per subtraho.

Post tio ili ludis "plantado de arbidoj", kiu postulas ke oni plantu ses arbidojn en tri vicigoj kaj ĉiu vicigo ricevu tri. "Tio estas

tro abstrakta," mi pensis. La knaboj meditis serioze, ĉar tiu, kiu la unua elpensis la rezulton, povas iri al la podio por demonstri. Ĉi-foje knabino kun bantoj estis la unua solvinto de la problemo. Ŝi iris al la nigra tabulo kaj gluis ses "arbidojn" en formo de triangulo. Prave. Poste ankaŭ du aliaj knaboj vicigis du alifor-

# Edeno de infanoj

de ŬEJ LJAŬ

“Niaj instruistoj ofte kondukis nin al Ŝjangŝan-parko, Ŝjiŝan-monto kaj Ĝinding-monto por kapti papiliojn. La papilioj flu-

gantaj en floroj kaj arbaroj sorĉis min, kvazaŭ mi fariĝus papilio kaj flirtus kune kun ili en serena printempa tago. . .” La knabi-

no, kiu iam diris tion, nun lernas en supera mezlernejo, tamen, ŝia versaĵo “Papilio”, kiu gajnis la unuan premion de la lando en la

majn triangulojn. Ankaŭ ili ĝuste solvis la problemon.

En tiu leciono oni faris ankaŭ interesan ludon “Kunikletoj metas rafanojn”. La instruistino gluis “rafanojn” kun kalkulaj problemoj al la nigra tabulo kaj postulis, ke tri knaboj portantaj sur la kapo kunikloformajn kronojn metu rafanojn kun rezultoj de 5, 8, 12 respektive en la korbojn. La ludo vekis grandan intereson de la geknaboj, sed la instruistino devis fini la lecionon.

Mi adiaŭis la instruistinon, ĉar ŝi devis doni alian lecionon.

Du tagojn poste mi denove vizitis ŝin en ŝia kabineto. Mi menciis la aritmetikan lecionon, kiun ŝi donis. Ŝi diris al mi, ke la kutima instrumentado de nia lando estas, ke instruisto donas lecionon kaj la lernantoj aŭskultas. Tia leciono, kian ŝi donis, estas ĵus komencita. Ni nomas ĝin amuza leciono. Oni donas malsamajn amuzajn lecionojn al malsamaj klasoj, en konsidero de malsamaj aĝoj kaj malsamaj klercoj de lernantoj. Ekzemple, oni aranĝas parolan lecionon por malaltaj klasoj, muzikan kaj literatur-aprekan lecionojn por altaj klasoj. La celo de amuza leciono estas ŝanĝi la ĉinan tradi-

cian instrumentodon kaj mobilizi la lerno-aktivecon, pens-kapablon kaj iniciativon de lernantoj. Nun la metodo estas en provado, tial la instruaj materialoj kaj helpiloj estas preparitaj de instruisto mem.

Instruistino He diris al mi ankaŭ, ke la lernantoj de tiu klaso antaŭ duonjaro ankoraŭ estis en infanĝardeno. Ili estas viglaj kaj nekvietigeblaj, ne povante koncentri sian atenton por aŭskulti lecionon pli ol dudek minutojn. Tial en la unuaj tagoj oni aranĝis tri lecionojn antaŭtagmeze, po 35 minutoj, kaj poste oni donas kvar lecionojn antaŭtagmeze kaj du posttagmeze ĉefe por eksterdoma ludado. Krom la amuzaj, ankaŭ aliaj ordinara lecionoj estas iel spicitaj. Ekzemple, instruante ordajn numeralojn, oni ripetas la ludon de “gluado de nazo”, en kiu knaboj devas glui slipojn kun cifero al certa loko de papera homfiguro kaj trovi pli aĝan kaj pli junan fratojn (cifer-ordo).

Oni aranĝas ses aritmetikajn lecionojn en semajno por unua klaso. Unu el ili estas amuza. Fakte tiu amuza leciono estas efika. La lernantoj ne nur akiris sciojn, sed ankaŭ ekzercis kapablojn de observado kaj diferencigo, ekz. en la ludo distingi ko-

kojn de anasoj. La ludo de “plantado de arbidoj” enkorpigas la abstraktan matematikan problemon en konkreta objekto, kio estas pli facile perceptebla ol la ordinara matematika formulo aŭ grafikaĵo.

Ĉu tia metodo malhelpas regulan instruadon? Por solvi mian dubon, instruistino He malfermis antaŭ mi aritmetikan lernolibron de la unua klaso kaj diris: “La tasko de la unua semestro de la unua klaso estas instrui ordajn numeralojn kaj adicon kaj subtrahon de unu ĝis dudek. Nun ni jam plenumis la taskon. Krome la geknaboj lernis ankaŭ rudimentajn sciojn pri horloĝo, mono kaj adicio kaj subtraho de unu ĝis cent, kiujn oni devas instrui en la dua semestro. Por lernigi adicon de unu ĝis dudek per ordinara metodo, oni bezonis tridek horojn. Ĉi-foje ni lernigis ĉefe decimal-kalkulan metodon al lernantoj, inspirante al ili solvi analogajn problemojn per la sama metodo. Rezulte ni plenumis la taskon en nur unu leciono.

Instruistino He devis iri al leciono. Mi akompanis ŝin ĝis la klasĉambro per rigardo. Kaj el la klasĉambro aŭdiĝis ŝia milda voĉo kaj naiva ridado de geknaboj.



Monda Versaĵo-konkurso por infanoj en 1981, restas ankoraŭ en la memoro de la geknaboj de la Elementa Lernejo de Ŝiĝa-strateto. Oni povas diri, ke la versaĵoverkadon inspiris al ŝi la enhavoriĉa aktivado de la biologia grupo de la lernejo.

La Elementa Lernejo de Ŝiĝa-strateto havas kompare bonajn kondiĉojn. Kiel multaj aliaj elementaj lernejoj de Ĉinio, ĝi utiligas postlecionajn horojn por organizi grupon por helpi al la dumlecionara instruado kaj disvolvi la intelekton de la lernantoj. Laŭ la leĝo de la evoluo de la infanoj en spirito kaj fiziko, la lernejo organizis malgrandan klubon kaj postlecionajn kursojn, plene konsiderinte pri diversaj karakteroj kaj interesoj de la lernantoj.

La malgranda klubo estas organizita de junpioniroj. Ili kolektiĝas kvar fojojn semajne po duonhoro. En la klubo, sen distingo de klasoj, la lernantoj laŭ sia plaĉo rigardas televidon, legas librojn, partoprenas en elektronika ludado, ŝakado, pilkludado ktp. Dank' al ĝoja distrado, la infanoj sin liberigas el la laco psika kaj fizika.

Krom la malgranda klubo, la infanoj ĉeestas ankaŭ postlecionajn kursojn je unu horo, tri foje semajne. Laŭ sia ŝato la geknaboj de la unua ĝis la kvina klaso, memvole lernas biologion, fotografion, ĉinstilan pentrarton, kaligrafion, metiarton, kantadon, dancon, la japanan kaj anglan lingvojn, uzadon de komputero, instaladon de radioaparatoj kaj aviadil-modeloj, kaj ludadon de akordiono, violono, plukinstrumento, korbopilko, tablotenis ktp. Laŭ diversaj aĝoj kaj niveloj de la infanoj, oni dividis la kursojn en elementan kaj progresigan. Instruistoj de la lernejo



*Specimenoj de insektoj kolektitaj de infanoj*



*Membroj de la malgranda klubo ludas kordmuzikilon.*

funkcias kiel direktantoj. Krome, funkcias kiel direktantoj ankaŭ invititaj fakuloj el altlernejoj, literaturaj kaj artaj rondoj kaj scienc-esploraj unuoj.

La kurso estas edeno por la geknaboj, tie ili kreskas intelekte kaj morale en la gaja atmosfero.

Nun ĉiuj membroj de la kurso de biologio estas knaboj, kiuj



*Infanoj uzas komputeron.*

estis petolemaj antaŭe, kaj nun ili fariĝis insekto-amantoj. Helpe de instruistoj, la kursanoj kolektis grandan kvanton da insektoj kaj lernis fari specimenojn kaj koni la karakterizaĵojn de la insektoj. Ili faris specimenojn de insektoj de 400-500 specioj el ĉ. 100 familioj. Ili scias iliajn nomojn kaj povas priskribi iliajn trajtojn. Lastjare, ili gajnis la unuan premion en la Deka Konkurso pri Distingo de Centfamiliaj Insektoj, okazinta por insekto-amantoj de elementaj kaj mezgradaj lernejoj de Pekino.

La kurso de komputero fondiĝis en septembro 1984, kaj ĝi iras tre vigle. Ĝiaj pli ol 50 membroj estas lernantoj de la 4-a, 5-a kaj 6-a klasoj. Nur en tri monatoj ili ellernis la fundamentajn sciojn pri komputero, manipulado de

ĝia klavaro, 17 frazmodelojn de fundamenta komputera lingvo kaj povis redakti multe da matematikaj problemoj kaj fari simplajn programojn de diversaj bildoj. Sesaklasa lernanto Jang Li, kiu gajnis la trian premion en la Unua Konkurso de Komputera Programoj por Elementlernejoj de Dongĉeng-distrikto, Pekino, raportis pri kompreno pri uzado de komputero, dirante: "Dank' al la programa analizado kaj modifado, ni altigis nian kapablon pensi kaj analizi kaj multe pli bone funkciigas nian cerbon."

Por eksciti la intereson de la lernantoj, la lernejo okazigas ĉiusemestre ekspozicion de "Lertaj Manoj", en ĝi videblas iliaj duonkonduktantaj aparatoj, modeloj de aviadiloj, malgrandaj

tablolampoj, malgrandaj motoroj, specimenoj de dekoj da vegetaĵoj kaj insektoj, broditaj kapkusentegoj kaj tablotukoj ktp. La ekspoziciaĵoj estas laŭdataj de diversrondaj personoj, precipe grupoj delikate faritaj el pinkonusoj, kok-plumoj, bambuaj bastonoj kaj paperaj skatoloj; kaligrafiaĵoj kaj ĉinstilaj pentraĵoj ŝatataj de geknaboj; versimilaj argilaj skulptaĵoj k. a. Ili ĉiuj estas allogaj por la eksterlandaj vizitantoj.

Komprenoble, ne estas facile funkciigi tiujn kursojn. La plej granda malfacilo estas manko de mono. Por solvi la malfacilon, instruistoj faris multege. En la amaso de eluzitaj lignaĵoj ili trovis malnovajn tabulojn, segis kaj purigis ilin por fari el ili subportilojn de duonkonduktantaj aparatoj. Por meti en skatolon la specimenojn faritajn de biologia kurso, instruistoj aĉetis vitrajn striojn kaj kungluis ilin por fari skatolon. Kaj krome, instruistoj uzis la kovrilojn de dentopastujoj kiel ĝiajn apogilojn. En la ekspozicio de la distrikto la elegantaj kaj solidaj specimenaĵoj estas multe laŭdataj, iuj eĉ pensis, ke ili estas faritaj de fabrikoj.

La pli kaj pli rimarkindaj sukcesoj, akiritaj de la lernejoj en la postleciono aktivado, multe ĝojigis iliajn gepatrojn. La patro de iu lernanto de la unua klaso diris: "Lerni estas ĝuo por infanoj. Ili rakontas al siaj gepatroj la sciojn lernitajn en la lernejo, tio montras, ke ili bone komprenas kaj klare memoras tion, kio estas instruita. Mia filo, lernanto de la unua klaso, lernis en la kurso pri radio mallonge kaj povas skribi pli ol unu paĝon da nomoj de radioricevilaj elementoj, kio mirigis min. Mi kore dankas la lernejon pro ĝia kulturo."



# Pentraĵoj de ĉinaj knaboj premiitaj per internacia ora medalo

Fotoj de ĜENG JUNFENG



*Pentristetoj*


En la lastaj jaroj preskaŭ 10 000 geknaboj 5-15-jaraj de 31 elementkaj mezlernejoj de Sujning-gubernio en Ĝjansu-provinco, orienta Ĉinio, faris ĉ. 40 000 pentraĵojn, el kiuj pli ol 2 000 estis eksponataj en la lando aŭ en urboj de la provinco. 552 el ili estis montrataj sinsekve en Usono, Japanio, Francio, Hispanio kaj aliaj 26 landoj. El tiuj verkoj 41 ricevis internacian premion kaj 12 el ili estis ormedale premiitaj.

La pentraĵoj priskribis belajn aferojn plej bone konatajn kaj plej interesajn por la aŭtoroj kaj esprimis ties naivan senton, saĝon kaj kapablon.

Por subteni kaj gvidi geknabojn tiuflanke oni fondis en la gubernio la Asocion de Laborantoj por Geknabaj Pentraĵoj.

*“Paraŝutado”, farita de Gang Ĉunmej (9-jara) kaj ricevinta oran medalon en internacia konkurso*






*"Grundgimnastiko",  
farita de Ŝjaŭ Ting-  
ting (7-jara) kaj  
premiita per ora  
medalo*



*"Arbaro en Ma-  
teno", farita de Ŝju  
Jan (7-jara) kaj or-  
medale premiita en  
Jugoslavio*






*"Tradicia Ĉina Luktarto", farita de Ju Ping (11-jara) kaj ricevinta oran medalon en internacia konkurso*

*"Printempo", farita de Ĝoŭ Jan (9-jara) kaj ricevinta la internacian unuan premion*

*"Konkurso de Drakboatoj", farita de Ŭang Ĉing (7-jara) kaj or-medale premiita en Jugoslavio*





*La haveno Ljanjungang*

**MALFERMITAJ URBOJ**

# Naturdotita Haveno Ljanjungang ĉe la Flava Maro

Fotoj de ŬANG ŜOŬLJANG

*La karbokajo de Mjaŭling en  
konstruado*

*En la bier-kontrolejo de la  
Limigita Manĝaĵa Kompanio  
Santori*





**L**JANJUNGANG, haveno en norda Ĝjangsu-provinco, situas meze de la longa marbordo de Ĉinio. Ĝi estas haveno la plej proksima al la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero kaj la nordokcidenta Ĉinio. Ĝuste tie komenciĝas la fama Longhaj-fervojo, kiu trairas la provincojn Ĝjangsu, Anhuj, Henan, Ŝenŝji kaj Gansu. Ĝiaj ŝoseoj atingas la Ĝjangsu-provincan ĉefurbon Nankino, Nantong, Ŝjuĝoŭ, Ĉingdaŭ kaj aliajn lokojn. La regiono, trapasata de la fervojo, nomata ekonomia centro de Ĉinio, konsistigas trionon de la ĉina teritorio.

La urbo kaj la de ĝi administrataj tri gubernioj Donghaj, Gan-ju kaj Gŭanĵun kovras 5 881 kvadratajn kilometrojn kun 2 930 000 loĝantoj. La urbo, situanta ĉe monto, rigardas al la maro. La insuloj kuŝantaj ekster la haveno funkcias kiel ĝia natura ŝirmilo. En tiu neglaciiga haveno estas kvin 10 000-tonelaj ŝip-haltejoj kaj kvar 3 000-5 000-tonelaj ŝip-haltejoj. Ĝia jara transportata kvanto estas 9 milionoj da tunoj. Pere de la rivera navigacio la haveno ligiĝas kun la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangĝoŭ kaj la riveroj de la baseno de Jangzi-rivero. Eksterlande Ljanjungang interrilatas kun 176 havenoj de 34 landoj kaj regionoj de la mondo. Nun ĝi estas unu el la ok grandaj maraj havenoj de Ĉinio.

Ljanjungang, riĉe naturdotita, estas ĉefa produkto de sojfabo kaj ternukso de Ĝjangsu. Tie la abundaj plantaĵoj por formacio, fibro, parfumo kaj oleo formis kompletan ekologian sistemon de la varmeta zono. La 4 000-hektara fruktoĝardeno kaj 660-hektara vinberejo ĉiujare donas 25 000 tunojn da pomo, piro,



*Kiam Ljanjungang kaj la japana urbo Sakai ŝi fariĝas amikaj urboj, loĝantoj de ambaŭ flankoj plantas arbon simbolantan amikecon.*




*Ladfrukto eksportota*

kratag-frukto, kaŝtano, ginko-frukto k. a. Tie konserviĝas abundaj subteraj minaĵoj. Nun estas konstatitaj kaj ekspluatataj fosforo, oro, arĝento, kupro, fero, barito, silicio, kianito (ang. *kyanite*), gemo kaj aliaj pli ol 30 specoj. Tie la konservo-kvanto de serpentino estas 400 milionoj da tunoj. La mineralo estas streĉe ekspluatata kiel unu el la konsistigaj partoj de la Ŝtala Kompanio Baŭŝan de Ŝanhajo. Tie la konservo-kvanto de kris-

talo kaj ĝia jara produkto-kvanto konsistigas trionon de tiuj de la tuta lando. La haveno kun marbordo 150-kilometra kaj 50 000-hektara povas liveri ĉiujare 60 000 tunojn da akvo-produktaĵoj. Hajĝoŭ-golfo, unu el la ok plej grandaj fiŝejoj de Ĉinio ja troviĝas tie, kie oni povas kapti ĉiujare 40 000 tunojn da fiŝoj, kaj tie produktiĝas 30 specoj de maraj frandaĵoj, ekz. glehnio (*Glehnia littoralis*), holoturio, klamiso (*Chlamys farreri*), halio-



*Ekfunkciaj plasto-fabrika kun kompleto da importitaj japanaj fiŝretproduktaj ekipaĵoj. Jen japana specialisto kaj ĉinaj laboristoj kontrolas la kvaliton de fiŝreto.*



tiso (*Haliotis gigantea*), meretrikso (*Meretrix meretrix*), arco (*Arca subcrenata*) k. a. Tie estas 3 300-hektara salikoko-bredejo, kies jara produktokvanto konsistigas 2 kvinonojn de tiu de la tuta lando. Tie estas ankaŭ famaj fabrik-similaj bredejoj de kraboj kaj salikokoj.

La urbo havas kompare kompletajn industriajn branĉojn, inkl. de kemiindustrio, tekstilado, maŝin-fabrikado, ledpretiga-

do, plast-fabrikado, elektroniko, metiarto, belarto, farmacio kaj konstru-materialo. Tie estas 1 250 industriaj entreprenoj, el kiuj 50 okupas gravan lokon en la industria produktado de la lando kaj provinco. Ĝiaj klozetpapiro kun marko Pando kaj seka vino kun marko Hŭagŭo-monto gajnis arĝentan medalon de la ŝtato. Ankaŭ mantukoj, jutsakoj, transformatoroj k. a. de Ljanjungan okupas gravan lokon en

*Japanaj amikoj vizitas konko-skulptejon.*



produktado de tiuj objektoj. Tie estas Hŭajbej-salfarejo, unu el la kvar plej grandaj salfarejoj de nia lando, kaj fosfor-minejo Ĝinping, unu el la ses plej grandaj fosfor-minejoj de Ĉinio. Tie estas ankaŭ grava sodofarejo, unu el la produktaj bazoj de Ĉinio.

Nun, kiam Ĉinio praktikas malferman politikon al la eksterlando, avantaĝoj de la urbo forte allogas la industriistojn kaj komercistojn de multaj landoj kaj Hongkong kaj Aŭmen. En la postaj tri trimestroj de 1984 ne nur hongkong-anoj investis pli da kapitalo tie, sed ankaŭ pli ol 700 komercistoj el Japanio, Usono, Britio, Francio, FR Germanio, Italio, Svisio, Danlando, Aŭstralio, Jugoslavio k. a. faris traktadon pri 300 ekonomiaj kaj teknikaj kunlaboraj kontraktoj. La urba registaro jam sankciis 128 konstruojn investitajn de fremdaj kapitaloj en formoj de kompensa komerco, luado kaj popola monpruntedono, kuna investado, kuna produktado kaj kuna ekspluato kaj prilaboro de importitaj materialoj. La Limigita Man-





*Senĉese progresas la produktado de la Kvara Plasto-fabriko dank' al ĝia renovigo de la ekipaĵoj.*

ĝaja Kompanio Santori, ekfunkciigita la 1-an de novembro, 1983, ja estas entreprenata kune de Ĉinio kaj Manĝaj-kompanio Santori de Japanio. La kompanio uzas la fabrik-domojn kaj ekipaĵojn de la ekzistanta bier-farejo de la urbo kaj ricevas ĉe la loko necesajn hordeon, rizon kaj lupolon. Pasintjare la kompanio produktis bieron kaj malton po 15 000 tunoj kun la marko "Hŭagŭo-Monto". Havante investon de 32 270 000 usonaj dolaroj, la kompanio estas la plej granda manĝaj-entrepreno kune investita de Ĉinio kaj Japanio. La similaj teknik-renovigaj objektoj nombras 180 inter la enkondukitaj objektoj en la venontaj 5 jaroj, 91 el ili estos transdonitaj al produktado en la estontaj 2 jaroj. Ili kune kun la 510 entreprenoj projektitaj enlande certe akcelos la teknikan progreson kaj ekonomian konstruadon de la urbo Ljanjungang.


La Nova Haven-areo Mjaŭling estas grava konstruaĵo investita de la ŝtato. Laŭ la plano tie aperos karbokajo por 35 000-tonela ŝipo, kio levos la transportan

povon ĝis 20 milionoj da tunoj. Tie oni konstruas ankaŭ 600 000 tunan sodo-farejon, renovigas la orientan parton de Longhaj-a Fervojo kaj plivastigas Ŝinhaj-elektrejon. Post la kursoj Ŝanhajo-Ljanjungang-Pekino kaj Ŝanhajo-Ljanjungang-Ĉingdaŭ oni planas malfermi kurson Ŝanhajo-Ljanjungang-Nankino. Krome la urbo nun plenenergie plibonigas la povon kaj kvaliton de siaj komunikado, elektro-produktado, hotela servo kaj komercado.

Ljanjungang estas ne nur komerca haveno kun longa historio, sed ankaŭ promesplena turisma loko. Ĉe la antaŭurbo kuŝas kelke da montoj, kiuj portas la nomon Juntaj-montaro kun 157 pintoj, ĉiu havas belajn pejzaĝojn. Tie la pejzaĝo estas bela, historiaj objektoj grandnombraj,

inter kiuj estas paleolitika restaĵo unika en la sudorienta marbordo de Ĉinio, surrokaj skulptaĵoj budhismaj de Kongŭang-monto aperinta pli frue eĉ ol la freskoj en Dunhŭang. La Varmfonto Donghaj kaj Marborda Banejo estas bonaj sanatoriaj lokoj kaj somerumejo. En la unua projekto estas 14 pitoreskejoj kaj pli ol 100 belvidejoj. Precipe menciinda estas la fama Hŭagŭo-monto — la fama simio-monto priskribita en la mita klasika romano de Ĉinio — "Pilgrimado al la Okcidento", en kiu allogas multaj pejzaĝoj, ekz. 72 kavernoj, Akvo-kurtena Kaverno, Sudĉiela Pordo, Ĉiel-imperiestra Palaco kaj Laŭĝjun-halo kaj nebulvualita montpinto plena de strangaformaj rokegoj. La nuna Hŭagŭo-monto kun novigitaj domoj estas atendantaj en- kaj eksterlandajn turistojn.

*Higiena papero produktita de la Paperfarejo de Ljanjungang, gajninta la arĝentan medalon de la ŝtato*





*Manĝaĵ-foiro en Tjanĝin*

# En la manĝaĵ-foiro de Tjanĝin

de ĜANG MEJĜI kaj GE ŜI

Fotoj de ĜI ĜU kaj MA ĈJUAN

**K**IAM ni atingis Tjanĝin per trajno, jam estis la unua kaj iom pli posttagmeze. Kie manĝi? Denove antaŭ ni prezentiĝis la demando, kiu leviĝis preskaŭ ĉiufoje kiam ni venis tien por intervjuo. Sed por ĉi fojo ni ambaŭ diris preskaŭ unuvoĉe: Iru al la Manĝaĵ-foiro de Tjanĝin.

Ĝi estas novtipa foiro, kie oni povas aĉeti famajn manĝaĵojn kaj diverslokajn frandaĵojn, fondita de Tjanĝin por disvolvi la trian industrian. La foiro havas sume 110 entreprenojn, kiuj povas servi samtempe al ĉ. dek mil homoj. Transirinte la straton Heping, ni turnis nin en homplenan strateton. Post piediro de ĉ. dek minutoj, ni vidis la turojn de la foiro en malproksimo. Ho, kia konstruaĵo! La griza brikmuro alta je tri etaĝoj rememorigas antikvan kastelon, kaj la kvar turoj kun leviĝantaj tegmentanguloj el verde glazuritaj tegoloj kaj kvar dekoraciaj arkadoj montras la foiron kvazaŭ antikvan palacon. La giganta konstruaĵaro havas po unu arkforman pordon en ĉiuj direktoj.

La manĝaĵ-foiro kovras 2.4 hektarojn kun totala areo de pli ol 40 000 kvadrataj metroj. Du interkruciĝantaj stratoj dividis ĝin en kvar par-

tojn, kaj vitra volbo de la stratoj interligas ilin. En la strata kruciĝejo kuŝas grandabedo.

Ni troviĝus kvazaŭ en palaco de kulinara arto, kie koncentre vendiĝas famaj manĝaĵoj kun lokaj gustoj de Gŭangdong, Ĝeĝjang, Hunan, Ŝandong, Siĉŭan, Ŝanŝji, Pekino kaj Tjanĝin kaj funkcias restoracioj, drinkejoj kaj tetrinkejoj. Inter ili estas ankaŭ marnutraĵaj, vegetaraj kaj islamaj restoracioj. Oni tie povas ĝui pladojn el ĉasaĵo aŭ pladojn preparitajn laŭ palaca kuirarto, ordinarajn kamparanajn manĝaĵojn, etmanĝaĵojn, malvarmajn trinkaĵojn, eŭrop-tipajn manĝaĵojn. Krome, tie troviĝas ankaŭ diversaj manĝaĵ-vendejoj, belartaĵa vendejo, fotostudio kaj distrejo. La foiro impresas vere mirinde. Estas ne senkaŭze, ke la foiro jam altiris al si atenton de la tuta lando, tuj post kiam ĝi malfermiĝis al la publiko en la Novjara Tago ĉijare.

Antaŭe en la sidejo de la foiro estis multe da kadukaj loĝdomoj. Eĉ nun ĉirkaŭ ĝi etendiĝas ankoraŭ vasta loĝkvartalo. La foiro plenumas oportunan servon al la proksimaj loĝantoj kaj, kompreneble, ankaŭ al turistoj venintaj el diversaj





*La drinkejo Ŝjanheng*

lokoj. La foiro ne nur solvas la demandon de manĝo, sed ankaŭ donas al manĝantoj elektelecon, por ke ili manĝu bone kaj kontente. Kiam la tria industrio de Ĉinio eniros en novan etapon de disvolviĝo, la foiro ja estas kuraĝa provo.

Je la kvina aŭ sesa ĉiumatene multe da vendejoj komencas akcepti gastojn. Ili liveras diver-

sajn matenajn manĝaĵojn, kiaj frititaj pastrinĝoj, sojfabkazeo, vaporumitaj pastaĵoj, farunkaĉo, bakitaj kukoj kun sezamsemoj kaj diversaj farĉoj. Sendube, ili multe pli plaĉas al tiuj, kiuj antaŭe manĝis nur tiajn bongustaĵojn ĉiumatene. Tial, ĉiutage, kiam apenaŭ elkrepuskiĝas, la lunĉejoj estas jam homplenaj. Kaj en la tagmezo proksimaj loĝantoj, precipe emeritoj, iras al la foiro duope aŭ triope por manĝi tie mane tinfaritajn vermiĉelojn, vaporumitajn aŭ frititajn pasteĉojn. Unuvorte, oni povas ricevi tie oportune ĉian manĝon. La laboristoj kaj oficistoj en deĵoro ne plu bezonas zorgi pri la tagmanĝo de la hejmaj maljunuloj.

Estas diversaj etmanĝaĵoj kun apartaj Tjanĝin-aj gustoj, ekz., frititaj kukoj kun "oreltruo", vaporumitaj pasteĉoj apetitaj kaj frititaj pastaĵoj fragilaj. Sed en la pasinteco manĝi tiajn manĝaĵojn estis ne facile eĉ por tiuj, kiuj longtempe vivis en Tjanĝin. Iu tjanĝin-ano diris emocie: "Nun en la foiro oni povas preni manĝon ĉiam ajn. Kvankam la vendejoj de vaporumitaj pasteĉoj, frititaj pastaĵoj fragilaj kaj frititaj kukoj estas nove fonditaj filioj, tamen la kvalito de la manĝaĵoj povas rivali kun tiu de la malnovaj vendejoj."

Ni trarigardis la foiron. Fine ni decidis preni vere kamparan manĝon kun Tjanĝin-a gusto: bakitajn kukojn kaj kuiritajn fiŝetojn. Tial ni venis al malgranda restoracio funkciigata de kamparanoj de la gubernio Baŭdi de Tjanĝin. Ĝiaj aspekto, mebloj kaj manĝaĵoj havas fortan lokan guston. Post momenta atendo kelnero alportis la de ni



*Servistinoj en antikvaj virinaj kostumoj en la tetrinkejo Hongloŭ*



*Maljunuloj ĝuas pladojn preparitajn laŭ palaca kuirarto*

menditan manĝaĵon: flavajn maiz-farunajn kukojn kaj bonodorajn kuiritajn fiŝetojn. Tie ni aŭdis, ke antaŭe en la regiono de Tjanĝin ofte okazis inundo. Pro tio oni povis kulturi nur maizon. Tie produktiĝis ankaŭ fiŝoj. La bakitaj kukoj kaj kuiritaj fiŝetoj fariĝis ĉiutaga manĝo de kamparana familio. La manĝo havas alian nomon, t.e., kuirajo en sama kaldrono. Por prepari la manĝon oni devas kuiri fiŝojn kun diversaj spicoj funde de la kaldrono kaj baki maiz-farunajn panojn ĉirkaŭe de fiŝoj. La manĝaĵo odoras je fiŝo kaj maizo. La bongusta maizpano estas preparita el faruno el nove rikoltita maizo, delikate muelita kaj la fiŝplado el vivaj fiŝoj. Estas interese, ke oni povas preni manĝon de kamparana familio en movoplena urbo.

Ankaŭ estas granda plezuro drinki en la drinkejo Ŝjanheng. Kiel priskribis la fama ĉina verkisto Lusin en sia novelo, la drinkejo Ŝjanheng situas en la malgranda urbeto Luĝen de Ŝaŭŝing de Ĝeĝjang-provinco en suda Ĉinio. Nun ĝi funkcias en la foiro de Tjanĝin en norda Ĉinio. Ĝiaj aspekto kaj interna aranĝo restas samaj kiel priskribitaj de Lusin en lia novelo. La granda vendotablo havas malnovan formon. Kelneroj en robo kaj kun felta ĉapo sur la kapo kaj kelnerinoj en vesto de vilaĝa knabino de Ŝaŭŝing foje-refoje

prezentas al gastoj pladojn kaj vinon. Kaj la gastoj gustumas longe konservatan flavan rizan vinon de Ŝaŭŝing kaj manĝas fabojn kun anizo kaj diversajn etpladojn de Ŝaŭŝing. Se kelnero ne parolus en la Tjanĝin-a dialekto, la gastoj eble sentus, ke ili manĝas en la urbeto de suda Ĉinio.

En la foiro troviĝas ordinaraj manĝejoj kaj ankaŭ nemalmultaj grandaj tradiciaj restoracioj. Inter ili estas la restoracio Hujfang. Malnovaj tjanĝin-anoj scias, ke en Tjanĝin troviĝas ok plej famaj islanaj restoracioj. Kaj Hujfang okupis la unuan lokon inter ili kaj havas longan historion. Dum la pasintaj pli ol cent jaroj ĝi dufoje bankrotis.

La restoracio Hujfang estas ĉe la nordokcidenta angulo de la foiro. En la unua etaĝo oni vendas simplajn manĝaĵojn, vinon kaj pladojn; en la dua ekskluzive rostitajn pekinajn anasojn kaj la tria uziĝas por festeno. Festeno preparita de ĝi el unu tuta ŝafaĵo estas tre fama. El unu tuta ŝafo oni povas prepari 108 pladojn kun malsamaj gustoj kaj koloroj. Bedaŭrinde, ĝis nun estas neniu, kiu jam gustumis ĉiujn tiujn 108 pladojn. La restoracio nun preparas ĉefe pladojn de freŝaj salikokoj kaj fiŝoj. Ĝiaj frititaj salikokoj





*Servistinoj de Cungu-restoracio preparas kukojn kun Tjanĝin-a gusto.*

de longe ĝuas renomon kaj des pli fama estas ĝia stufita ŝarka naĝilo.

Multaj havas kutimon trinki glason da teo post manĝo por redukti grasecon kaj akceli digestadon. En la foiro funkcias tetrinkejo. Ĝi nomiĝas Hongloŭ, kies nomo venis de la ĉina klasika romano "Songo de Ruĝa Buduaro". Ĝia interna aranĝo reaperigis la priskribon en la romano: brunaj malmol-lignaj pordoj kaj fenestroj kun gravuritaj desegnoj, rondaj tabloj kaj kvadrataj seĝoj. La kelnerinoj portas antikvajn longajn jupojn kaj havas antikvan hararanĝon.

La tetrinkejo Hongloŭ estas ne nur loko por trinki teon, sed ankaŭ taŭga loko, kie esploristoj pri "Songo de Ruĝa Buduaro" kaj aliaj instruituloj kunvenas por babili kaj diskuti pri esplorado.

La tetrinkejo estas entreprenata kune de la Ekspluata Kompanio de Komerca Ekonomio de

Tjanĝin kaj la Tekulturejo de Okcidenta Lago de Ĝeĝjang. Ankaŭ la drinkejo Ŝjanheng havas saman entreprenan formon. Kaj krome, en la foiro estas ankoraŭ multaj individuaj butikoj, kiaj Livendejo de la Enskatoligitaj Ĉinstilaj kaj Eŭropstilaj Pladoj, la Baŭlan-a Vendejo de Vegetaraj Manĝaĵoj, Ŭang-vendejo de Stufita Kokaĵo kaj aliaj dekoj da vendejoj. La restoracio Sanmaŭ (Triharuleto) kaj aliaj estas funkciigataj kune per ĉina kaj eksterlanda kapitaloj.

La restoracio estas la plej prospera el la pli ol cent entreprenoj en la foiro. Ĝi servas speciale por aranĝi naskiĝtagan festenon de infanoj en aĝo de malpli ol 14 jaroj. Ĝi estas la unika en Ĉinio. Sanmaŭ estas figuro de infano en la malnova Ĉinio kreita de fama ĉina karikaturisto Ĝang Leping. Estas serio da mizeraj kaj kortuŝaj rakontoj pri Sanmaŭ, kiujn bone konas ĉinaj infanoj. Kaj nun Sanmaŭ en bonorda vesto kaj fasko da floroj en la mano bonvenigas siajn amiketojn ĉe la enirejo de la restoracio. Li intime manpremas kaj salutas ilin. Ĉiu infano, kiu pasigas sian naskiĝtagon en la restoracio, ricevas unue enskatoligitan naskiĝtagan torton kun kandeloj. Kaj poste kelnero alportas delikatajn manĝaĵojn, trinkaĵon kaj ĉarman naskiĝtagan ĉapon. Helpate de kelnero, ĉiu infano donacas al siaj gepatroj du ruĝajn florojn faritajn de li. La restoracio amuzas la infanojn per fermcirkvita televido kaj elektronika ludado kaj donas al ili ĉiuj po unu foton por la naskiĝtago. Tie la infanoj gaje ludas laŭplaĉe. Ĉio tio donas al ili bonan rememoron.

*La naskiĝtago de la infano festata en la restoracio Sanmaŭ*



# POR LA 35-JARA JUBILEO DE EPĈ

## Gratulaj leteroj el Jugoslavio

Karaj gekamaradoj,

Akceptu korajn gratulojn okaze de via jubileo. La ekzisto de via revuo multe kontribuis al la riĉo de Esperanto-kulturo dum la pasintaj jardekoj kaj ni dankas al ĉiuj kiuj kunlaboris en la revuo kaj ĉiuj kiuj subtenis ĝin.

Mi deziras al vi persisti en la laboro dum la jaroj venontaj kaj esperas ke la jaro 1986 estos la mejloŝtona jaro por esperantistoj en Ĉinio.

Sincerajn salutojn

Zlatko Tišljar

direktoro de Inter-  
nacia Kultura Servo

Estimataj gesamideanoj,

Gratulojn pro la jubileo! Via jubileo estas pli ol la jubileo de ĉina revuo kiu uzas Esperanton. Ĝi estas grava atingo de Esperanto-Movado, kaj ĝi do estas ankaŭ ties jubileo.

Elkorajn dankojn al vi pro la kontinua longjara laboro kun plej sinceraj bondeziroj pro estonteco de via revuo kaj de Esperanto en Ĉinio.

Zlata Cundeković

Prezidantino de Kroa-  
tia Esperanto-Ligo

Estimata ĉefredaktoro kaj redaktoro,

Kun granda plezuro mi sciigis pri la 35-jara jubileo de EL POPOLA ĈINIO. Dum multaj jaroj ĝi estis kaj estas unu el miaj favorataj legaĵoj, kiun mi fiere montras al neesperantistoj.

Aparte plezurigas min vidi la konstantan pliboniĝon de la enhavo, kaj la grandan zorgon kiun ĝi dediĉas unuflanke al la diskonigado de sia lando, kaj aliflanke al la kontentigo de siaj legantoj.

Al EPĈ mi deziras longan kaj fruktodonan vivon, kaj al ĝiaj redaktoroj kaj kunlaborantoj forton kaj sanon por daŭrigi sian laŭdindan laboron.

Tre amike vin salutas

Tibor Sekelj

*Ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj montrataj en la Ekspozicio de Takatuki Esperanto-Societo. Jen s-ro Takeuti Yosikazu (la dua de maldekstre) konigas ilin al s-ro Emura Tosio (la tria de maldekstre), urbestro de Takatuki.*








# Pensoj pri 35 jaroj de El Popola Ĉinio, kaj pri "profito"

de WM. R. HARMON\*



Je la okazo de sia 35-jara ekzistado, EPĈ taŭge kaj plenmerite rikoltos gratulojn kaj laŭdojn el ĉiuj partoj de la Esperantista mondo. Tamen pli laŭdinda ol la simpla fakto, ke EPĈ daŭris tiom da jaroj estas la fakto, ke EPĈ maturiĝis kaj daŭre pliboniĝis, pliallogiĝis al ĉiam pli vasta legantaro.

Krom la konstateblaj diligentece kaj profesieco de la laborantoj kiuj preparas kaj eldonas EPĈ, eble la plej grava fonto de tiu kreskado kaj pliboniĝado estas la konstanta kaj sincera petado al la legantaro por kritikoj kaj sugestoj. Tia sinteno estas preskaŭ unika inter magazinoj. Kritikado ne estas tre bonvena ĉe redakcioj ĝenerale; la plimulto el ili havas fortan opinion mem pri kio estas la "normo" kaj kio "bona" por la legantoj. Egoismo ne povas okupi la saman animon kun emo bonvenigi kritikadon; kaj la mondo bezonas malpli da egoismo, pli da kunlaboremo. EPĈ montras la vojon tiel, kaj la sinteno de la redakcio de EPĈ estas imitinda. Tion, do mi elkore laŭdas — ne nur la 35 jarojn. Tiuj jaroj nur pravas, ke EPĈ sekvas la ĝustan vojon.

Ĉar mi gvidas la peradon de EPĈ en Usono, de tempo al tem-

po mi enskribas en la kontolibron de ELNA "profiton" el tiu perado. Pripensante tiun "profiton", kio estas monsumo, venis al mi la ekscio, ke profito ne devas temi nur pri mono. Tiu enspezo ĉe ELNA el la EPĈ-abonoj fakte daŭre laboras por Esperanto, ĉar tiu profito helpas subvencii aliajn agadojn, kaj ĉiu dolaro "profitas" des pli ene de la movado.

Kaj tiu penso tiris min al iom pli ĝenerala ekscio, ke "profito" ne estas limigita al mono. Vortaro difinas profiton tiel: "valora rehavo; restaĵo kiam enspezo superas elspezon". Pensu momente pri tute senmona "negoco", kiel rilato inter du homoj ĵus renkontintaj. Oni povas "elspezi" iom da sia tempo, por interesiĝi pri la opinioj kaj kapabloj de la alia. Se per bonvolo (kaj scivolemo, certe) ambaŭflanke la du trovas komunajn interesojn, dividante novan informon aŭ ideojn. la enspezo superas la elspezon kaj jen vera profito.

Kaj pli larĝe; se per elspezo de energio kaj tempo por lerni pli pri nekonata lando, raso aŭ grupo, oni povas tiel perdi la ŝarĝon de timo kaj protima malamo, akiri novajn ideojn kaj

opiniojn, per kiuj oni povas pli klare kaj freŝe vidi la mondon ĉirkaŭ si, kia profito rezultas! Kia valora rehavo!

Tiu difino de profito ĝustas, se "elspezo" kaj "enspezo" estas pozitivaj, same ĉu la temo estas financo aŭ vivo.

Ni legas pli kaj pli pri kunlaborado inter Ĉinio kaj kompanioj eksterlandaj, por rezultigi profiton al ambaŭ partneroj. Oni ne devas vidi tion kiel ian bazan ŝanĝon en ekonomiaj sistemoj. La profitoj el tiaj kombinoj ne estas nur monaj; la profitoj de internacia kunlaborado estas pretermonaj, ĉu bazitaj je financo aŭ ne. La pliproksimiĝo de landoj kaj ties popoloj per kunlaborado rezultigos profitojn eĉ al niaj genepoj, en tio ke envivebla mondo restos por ilia ĝuado.

Ni profitigu unu la alian, por plibone koni unu la alian. Feliĉe, tio okazas pli kaj pli inter Ĉinaj kaj Usonaj Esperantistoj. El Popola Ĉinio ege valoras; ĝi daŭru longe, kaj prosperu!

\* La aŭtoro estas estrarano de ELNA kaj ĉefdelegito de UEA.



*Kunveno de konsilantoj de la Konstanta Komitato de la Junnan-a Esperanto-Asocio*



## Esperanto en Junnan-provinco

de SAŬ BIN

**J**UNNAN estas granda provinco ĉe la landlimo de sudokcidenta Ĉinio. Tie estas riĉaj produktaĵoj, tutjare regas verdeco. En ĝi vivas 24 naciecoj, inter kiuj 23 estas nacimalplimulto, kies nombro okupas la unuan lokon en Ĉinio. Komprenble, ili parolas diversajn lingvojn. Jam en la 20-aj jaroj de ĉi jarcento, tie malmultaj intelektuloj akceptis kaj propagandis Esperanton.

En la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la nuna jarcento la provinco estis postiĝinta regiono de Ĉinio, kie la trafiko estis malfacila. Por veturi de la provinca ĉefurbo Kunming al Pekino oni devis trapasi Vjetnamion, Hongkongon kaj Ŝanhajon. Tio faris la kulturen interfluan neimageble malrapida. Malgraŭ tio, Esperanto ĝermis tie kiel printempaj burĝonoj kaj estis konata de intelektuloj. La 12-an de junio, 1932, la Junnan-a Esperanto-Instituto naskiĝis en Kunming.

Komence en la instituto laboris nur kelkaj homoj, sed la laboro iris vigle. En la tria tago

post la fondiĝo estis publikigita en la ĉina lingvo la semajna revuo "Junnan-a Esperanto-movado" kiel felietono de la "Respublika Ĵurnalo de Junnan". Post nelonge, estis publikigita ankaŭ Esperanta-ĉina felietono "Nuntempa Tajdo". En julio samjare ekfunkciis la matena Esperanto-Kurso de Dimanĉo. Ĝi planis varbi 100 lernantojn, sed fakte 150 homoj anoncis sin por lerni nian lingvon. Iuj laboristoj, kiuj havis labordeĵoron en dimanĉo, kune skribis al la instituto petante ke instruistoj donu lekciojn en ilia laborejo. Kunlaborante kun Radio Kunming, la instituto faris Esperantan disaŭdigon unufoje ĉiusemajne, kiu propagandis Esperanton kaj aŭdigis Esperantan konversacion. Krome, la instituto organizis ankaŭ por siaj membroj kaj lernantoj "Semajnan Ekskurson", por ke ili starigu inter si amikecon kaj faru Esperantan konversacion. Dank' al la fruktodona laborado de la instituto, Esperanto estis aprobita de pli kaj pli multe da homoj. La sinanoncantoj

atingis 400-500. Dum tiu tempo Ĝu Ĝjabi, Fej Bing kaj aliaj esperantistoj per Esperanto aktive propagandis la progresajn pensojn kaj kondukis gejunulojn al la vojo de lumo.

Tiam la Kuomintang-a registaro ĉiamaniere sufokis la progresan kulturon kaj persekutis progresajn kulturajn laborantojn, komprenble ili ne volas preterlasi ankaŭ Esperanton kaj homojn laborantajn por ĝi. En 1940, la Kuomintang-a registaro ekzamenis poŝtaĵojn. Respondeculo de la instituto Ĝang Ĝingĉiŭ estis arestita pro sia korespondado kun soveta esperantisto, kaŭze de tio la revuo "Junnan-a Esperanto-movado" devigite ĉesis eldoniĝi. En 1942, kiam japanaj agresantoj invadis Junnan el Birmo, nemalmultaj esperantistoj soldatiĝis kaj iris al la kontraŭ-japana fronto. Post la Kontraŭ-japana Rezistmilito eksplodis la Popola Liberiga Milito. Iuj esperantistoj prenis armilojn kaj partoprenis en la gerilo por fari la lastan batalon kontraŭ la reakcia

regado. En la jaroj plenaj de tumultoj kaj militfajroj la Junnan-a Esperanto-movado iom post iom stagnis.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la Junnan-Esperanto-movado revigliĝis, tamen iris zigzagan vojon. Nun maljuniĝis sinjoro Ĝang Ĝingĉiŭ, kiu faris grandan penadon por Esperanto kaj estis malliberigita en la malnova Ĉinio. Ĝu Ĝjabi, Fang Ĝongbo kaj aliaj, kiuj siatempo diligente lernis kaj fervore propagandis Esperanton, fariĝis gvidantoj. Ili starigis rilaton kun mezaĝaj kaj junaj esperantistoj de la provinco por daŭre disvolvi la tiean Esperanto-movadon.

Februare de 1980 ili okazigis Esperantan labor-kunvenon de la provinco kaj sekve fondis Esperantajn grupojn en la urbo Geĝiŭ kaj la gubernioj Juŝji kaj Janŝan, ekfunkciigis en Kunming Esperanto-kurson kun ĉ. 100 lernantoj kaj sendis du junulojn al Pekino por ke ili lernu en la porinstruista Esperanto-kurso funkciigata de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ili ankaŭ eldonis la revuon "Esp-movado En- kaj Eksterlande", kiu konigas la novajn sukcesojn de la Esp-movado. Surbaze de tio la 12-an de septembro, 1981, oficiale fondiĝis en Kunming la Junnan-a Esperanto-Asocio.

Post kiam la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko

*Junuloj de Junnan interparolas Esperante en somera semajno.*



reasertis, ke Esperanto povas esti instruata kiel nedevisa fremdlingvo, la tieaj diversrondaj personoj pli vigliĝis en la lernado de nia lingvo. La Junnan-a Esperanto-Asocio kaj Junnan-Universitato kune ekfunkciigis rapidan Esp-kurson kun 250 kursanoj. Ili estas profesoroj, docentoj, asistaj instruistoj, studentoj venintaj el Junnan-universitato, la Kunming-a Politekniko, Kunming-a Instruista Instituto, Kunming-a Medicina Instituto, Junnan-a politekniko, Junnan-a Nacimallplimulta Instituto, Junnan-a Eduka Instituto k. a. Por fondi estontece oficialan Esperanto-kurson en altaj lernejoj, la Junnan-a Esperanto-Asocio kaj Junnan-universitato kune funkciigas 2-jaran Esperanto-kurson en la fremdlingva fakultato de la universitato.

En aŭgusto 1982, la Junnan-a Esperanto-Asocio kaj la biblioteko de la provinco okazigis ekspozicion de Esperantaj eldonaĵoj por vaste propagandi Esperanton. Dum la eksponado Naokazu Kawasaki, fama japana esperantisto kaj profesoro de Nara-universitato, kaj fratino de internacia batalantino Verda Majo vizitis la urbon Kunming. Tie ili vizitis la ekspozicion kaj parolis intime kun Junnan-aj esperantistoj. Fang Ĝongbo, vicĉefsekretario de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la provinco kaj prezidanto de la

Junnan-a Esperanto-Asocio, donacis al ili "Verkoj de Verda Majo", komisiite de la Ĉina Esperanto-Ligo. La ekspozicio, kiu daŭris unu semajnon, vekis eĥon en la socio, profundigis la konadon de diversrondaj personoj al Esperanto kaj levis ilian entuziasmon al la lernado de ĝi. Multaj vizitantoj esperis, ke oni okazigos multe da similaj ekspozicioj por prezenti ŝancon lerni kaj legi Esperantaĵojn.

Por meti firman fundamenton al la Junnan-a Esp-movado kaj krei al gejunuloj bonajn kondiĉojn por lernado, samideanoj de la Junnan-a Esperanto-Asocio inaŭguris Esperanto-kurson en la Kunming-a Socia Universitato. Ili funkciigas ankaŭ Korespondan Esperanto-Lernejon kun 2 500 lernantoj el la tuta lando per la revuo "Estonteco". Ĝi havas konsultiĝajn staciojn en pli ol 20 provincoj kaj urboj kaj plejparto de la invititaj instruistoj diplomiĝis el la porinstruista Esp-kurso funkciigata de ĈEL. Nun ĝi jam fariĝis influhava korespondanta Esperanto-lernejo en Ĉinio.

Nun Esperanto rapide disvolviĝas en la tuta provinco. Ĝuste pro tio, la Ĉina Esperanto-Ligo decidis en la Tria Tutlanda Esperanta Laborkunveno okazigi la Unuan Ĉinan Esperanto-kongreson en Kunming en 1985. Nun la tieaj samideanoj aktive faras preparadon por tiu kongreso.

*En la ekspozicio de Esperantaj libroj kaj gazetoj*





**LA TJANĜIN-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA**

Je la 9-a de marto 1985 fondiĝis la Tjanĝin-a Esperanto-Asocio. La fond-kunvenon ĉeestis Si Ĝjan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tjanĝin-a Popola Kongreso, Tan Ŝaŭŭen, vicsekretario de la Tjanĝin-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, respondeculoj de koncernaj departementoj de la urbo kaj aliaj pli ol 200 esperantistoj. Tan Ŝaŭŭen salutis la kunvenon en la nomo de la urba komitato de la Partio. Ĉu Tunan, prezidanto de "Amikoj de Esperanto", sendis al la kunveno gratulajn vortojn kaligrafie skribitajn.

La kunvenantoj aŭskultis la raporton pri la laboro de la prepara grupo, aprobis la statuton de la asocio kaj elektis Fang Ĝji kiel ĝian prezidanton, Lin Feng (virino) kaj U Hŭo kiel ĝiajn vicprezidantojn, Gaŭ Ĉengĝi kiel ĝian ĝeneralan sekretarion. Laŭ invito de la prezidanto, profesoro Li Ĝjije fariĝis ĝia honora prezidanto, Fang Ĝigong ĝia honora vicprezidanto, Laŭ Ĵong kaj Jang Jukun ĝiaj konsilantoj. Por korespondi kun la asocio, skribu al: P.O. Kesto 207, Tjanĝin.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de "El Popola Ĉinio", la Ĉina Esperanto-Eldonejo, la Esperanta sekcio de Radio Pekino kaj la Pekina Esperanto-Asocio.

Tjanĝin kun 8 milionoj da loĝantoj estas ĉefa industria havenurbo de Ĉinio. Ĝia Esperanta movado iam estis tre vigla. En la tridekaj jaroj la land-fama Nankaj-a Mezlernejo jam havis Esperantan organizon. En junio de 1981 fondiĝis la prepara grupo de la Tjanĝin-a Esperanto-Asocio. Post sia fondiĝo la prepara grupo multe



*La fond-kunveno de la Tjanĝin-a Esperanto-Asocio*

laboris por propagandi kaj plivastigi Esperanton kaj elkulturis nombron da esperantistoj. Por plupaŝe akiri simpatian kaj subtenon de la diversaj rondoj de Tjanĝin, la asocio starigis sian Patronan Komitaton, konsistantan el famuloj, fakuloj kaj estroj de koncernaj departementoj de la urba registaro.

**LA UNUA ĈINA ORGANIZO LABORANTA PER ESPERANTO**

La Junulara Asocio de la Siĉŭan-a Branĉo de la Ĉina Ruĝ-kruca Societo, la unua ĉina organizo kun Esperanto kiel laborlingvo, fondiĝis en Ĉengdu, en la fino de 1984.

La fond-kunvenon ĉeestis pli ol 30 homoj, kiel Liŭ Junĝi, vicprezidanto de la Siĉŭan-a Popola Kongreso, Ĵen Ĉangfang, vicestro de la Siĉŭan-a Branĉo de la Ĉina Ruĝ-kruca Societo, Ŭej Jida, vicĉefsekretario de la Siĉŭan-a Esperanto-Asocio, membroj de la konsilantaro de la nomita Junulara Asocio kaj reprezentantoj de la Ŝinhŭa-a Novaĵagentejo, la redakcioj de la Ĉina Junulara Ĵurnalo, la ĵurnalo "Lumo", la Laborista Ĵurnalo kaj la Siĉŭan-a Ĵurnalo, la Siĉŭan-a Popola Radiostacio kaj la Siĉŭan-a Televizio.

Tio estas asocio de junaj ruĝ-krucaj volontuloj. Ĝia celo estas

akceli amikecon inter diversnivelaĵaj en-kaj eksterlandaj ruĝkrucaj societoj kaj tiun inter diverslandajn popolojn, disvolvi amikecajn rilatojn kaj kulturen interesanĝon inter diverslandaj junuloj, oponi kontraŭ agresa milito, defendi mondpacon kaj servi al la progrese afero de la homaro. La asocio studos medicinan teorion, propagandos la fundamentajn principojn de la Ruĝa Kruco, fondos sian organon "Ruĝ-kruca Junularo" por konigi sciojn pri prevento kaj kuraco de malsanoj kaj urĝa savo kaj okazigos kursojn de populara medicino kaj Esperanto.

Hu Zi'ang, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco, skribis por la asocio: "Disvolu la revolucion humanismon, kontribuu al la kvar modernigoj de la lando." Skribis ankaŭ Jang Ĉun, vicestro de la Ĉina Ruĝkruca Societo, Hŭang Ŝuze, konsilanto de la Sanprotektita Ministerio de Ĉinio, kaj U Ĝeping, prezidanto de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj.

Post la kunveno la estraro de la asocio vizitis veteranan esperantiston Lu Ĝjanbo, kiu gratulis ilin pro la fondiĝo de la asocio kaj esperis, ke esperantistoj, precipe junaj, altigos sian lingvan nivelon por kiel eble plej rapide kreski kaj kontribui al la mondpaco.

## TUTMONDA ESPERANTA BIBLIOTEKISTA ASOCIO

Antaŭ dek jaroj fondiĝis la Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj en Britio, sed bedaŭrinde ne sukcesis pro manko de laborfortoj. Nun oni denove organizas ĝin sub la nomo de Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio kun deziro krei solidan bazon de tiu asocio antaŭ la centjariĝo de Esperanto.

La celoj de la asocio estas kunligi esperantistojn-bibliotekistojn kaj diskonigi Esperanton pere de la bibliotekoj de la mondo. Ĉiuj interesigantoj kaj privataj Esperanto-kolektantoj povas kontaktiĝi kun la asocio per la adreso de la provizora sekretario Geoffrey King, 228, Capworth Street, London E10 7HL, G.B. Britio.

### TEJO-seminario

Ĝuste en la internacia junulara jaro TEJO anoncis sian novan internacian seminarion sub la temo "KOOPERATIVO KAJ JUNULARO". Ĝi okazos inter 22-28 de septembro 1985, en la urbo Tuzla, Jugoslavio. En la seminario prelegos reprezentantoj de adekvataj sciencaj kaj ekonomiaj institucioj, fakaj asocioj, kooperativaj movadoj kaj aliaj interesitaj organizaĵoj el pluraj landoj.

### INTERNACIA RENKONTIĜO DE POPOLAJ ORKESTROJ

En Etnografia Muzeo en Torun, Pollando, jam kvin-foje okazis Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj kun uzo de Esperanto kiel laborlingvo de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 1985.

Ĝisnunaj renkontiĝoj bone pruvigis, ke uzo de Esperanto dum tiu-speca internacia aranĝo solvas la lingvan problemon por la organizantoj kaj samtempe helpas popularigi la internacian lingvon en la kulturaj kontaktoj mondscale. La interesigantoj anoncu sin al: Mu-

*Prezentado de popola orkestro en 1984 en Torun*



zeum Etnograficzne w Toruniu, Wały gen.

kaj aperigadas ekde januaro 1985, 15-foje jare. Ĝi estas facila, distra, amuza, instrua kaj satira.

### NOVA GAZETO "OVO" APERAS EN JUGOSLAVIO


Enketo farita antaŭ du jaroj montris, ke jare oni instruas Esperanton en komenca nivelo al 50-100 mil gelnantoj (nekalkulante Ĉinion kaj Brazilon). Ĉirkaŭ 80% el ili estas gejunuloj. Sed de longe sentiĝas manko de revuo, kiu estas alloga por komencantoj (ĉefe junularo) kaj enhave kaj laŭ la lingva facileco. Tiucele la Kroatia Esperanto-ligo de Jugoslavio lanĉis la novan revuon "Ovo"

### LA LASTA VERKO DE MARINKO GJIVOJE APERAS

La verko "Leksikono de Aktivaj Jugoslavaj Esperantistoj" de la fama jugoslava esperantisto Marinko Gjivoje, kiu mortis antaŭ du jaroj, enhavas 1070 biografiojn kaj 400 fotojn de iam kaj nun aktivaj jugoslavaj esperantistoj. Ĝi estas presita sur bona papero per ofseto kun plastigita kolora kovrilo. La prezo por unuopa ekzemplero estas gld. 35.

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Pekino
2. Sanhajo
3. Tjanĝin
4. Tibeto
5. Kantono
6. Ljanjungang
7. Junnan
8. Jingkoŭ
9. Siĉŭan
10. Granda Sing'an-montaro
11. Heze
12. Ĝuangŝji






# Kantono- fenestro de suda Ĉinio

de ZU AN

Fotoj de SEN ĈEN



*Strato de Kantono*

**K**ANTONO, la plej granda urbo en suda Ĉinio, estas proksime de Hongkongo kaj Aŭmen (Makao), rigardas al la Suda Ĉina Maro kaj situas en la norda parto de la Delto de la Perla Rivero. Ĝi troviĝas en la subtropika zono kaj havas ĉarman pejzaĝon.

Legendo diras, ke antaŭ tre longa tempo tie sterniĝis senlima dezerto. Malgraŭ sia penega laborado oni sin vivtenis malfacile. En iu bela tago subite ekŝvebis en la ĉielo irizaj nuboj, kaj malleviĝis teren kvin feoj en bunta vesto, rajdantaj sur kvin-koloraj ŝafoj kaj tenantaj ses-spi-kajn grenplantojn. Ili donacis la grenon al la popolanoj, dezirante, ke ili neniam suferu de malsato, kaj tuj leviĝis al la ĉielo. Tiam la kvin ŝafoj transformiĝis en rokegojn. Pro tio Kantono nomiĝas ankaŭ Ŝafa Urbo kaj Spika Urbo.

Tiu poezia legendo montras, ke de la komenco de la agrikultura civilizacio en la homa socio ĉinoj jam laboras kaj vivas tie. En 862 a. K. oni starigis tie administracion. En 221 a. K., kiam la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio unuigis la tutan Ĉinion, oni konstruis tie urbomurojn kaj ĝi fariĝis la ĉefurbo de Nanhaj, unu el la 36 prefektujoj de Ĉinio. De tiam Kantono fariĝis politika, ekonomia kaj kultura centro de suda Ĉinio.

Ĉie en Kantono regas verdeco kaj videblas ĝardenoj kaj vizitindaj lokoj. La lago Liŭhŭa ĉe la nordokcidenta angulo de la urbo estis pitoreska natura lago antaŭ mil kelcent jaroj kaj iom post iom ŝlime obstrukciĝis poste. En la 50-aj jaroj de la nuna jarcento tieaj popolanoj faris ĝin artefarita lago kovranta 800 000 kvadra-

tajn metrojn kaj starigis la parkon Liŭhŭahu kun ĝi kiel la centro. Nun ĉirkaŭ la lago kreskas diversspecaj arboj, aromas belaj floroj. En la tempo, kiam prosperas la persikfloroj, en la aero ŝvebas abundo da palruĝaj florpetaloj kaj portiĝas sur la akvo. Estas granda plezuro ŝipveturi tiam en la parko. En la okcidenta parto de la parko kuŝas la parko Ŝijjŭan kun pli ol mil envazaj pejzaĝoj, iuj el kiuj estas antikvece modestaj, aliaj kokete ĉarmaj, triaj similaj al altaj neĝmontoj kaj kvaraj similaj al imponaj montpintoj. Ili, strang-formaj kaj koket-aspektaj, estas vere bildoj vivaj kaj poemoj senvortaj. Norde de la urbo estas la orkideo-ĝardeno Lanpu, fama pro siaj dek mil envazaj orkideoj centspeciaj, bonodoraj kaj plezurigaj. En la ĝardeno zigzagas

dense ombrataj padoj, punktiĝas rok-montetoj, plaŭdas falakvoj kaj ŝprucas klaraj fontoj. Dank' al ĉio ĉi ĝi impresas pli elegante kaj kviete en la homplena distrikto.

Inter la tieaj vizitindaj lokoj estas la temploj Gŭangŝjaŭ kaj Liŭĵong kaj la kultejo de Ĉen-familio, kiuj havas apartan originalecon. Gŭangŝjaŭ estas fama templo en suda Ĉinio. Ĝia korto estis konstruita inter 198 kaj 105 a. K. Origine ĝi estis loĝejo de la posteuloj de la reĝo de Nanjŭe-regno kaj estis malfermita kiel templo nur en la 3-a jc. Inter la 5-a kaj la 10-a jc. tien venis studi multaj hindiaj budhistoj. La ĉefa konstruaĵo Mahavira Halo, grandioza kaj kompakt-struktura, estis ekkonstruita en 397 p. K. Ambaŭflanke de la templo staras po unu fera pagodo kun historio de pli ol mil jaroj. La orienta pagodo estas kvadrata, sep-etaĝa kaj 7.69 metrojn alta kun ĉ. 900 niĉoj, ĉiu kun malgranda, delikate farita budha statuo ene. La okcidenta estas simila al la orienta. Ili estas la plej antikvaj feraj pagodoj en nia lando. La templo Liŭĵong situas en la urbocentro. Oni diris, ke en 1100 p. K. fama literaturisto Su Dongpo de Song-dinastio vidis tie ses antikvajn banjanojn kaj tuj skribis ideografiaĵojn "Liŭĵong". (en la ĉina lingvo liŭĵong signifas "ses banjanojn — Trad.") Ĝuste pro tio la posteuloj nomis la templon mem Liŭĵong. En la templo estas fama brika-ligna pagodo, kiu estis konstruita en 537 p. K. kaj rekonstruita en 1097. La pagodo ok-angula, naŭ-etaĝa ekstere kaj 17-etaĝa interne, altas 57 metrojn. La impona pagodo, kiel ĉielskrapanta bukedo, montras la arkitekturajn stilon kaj formon de Song-dinastio. La pagodo ebligas okulplaĉan birdvidon de la tuta pitoreska urbo. La kultejo

de Ĉen-familio konstruita en la fino de la 19-a jc. estas fama konstruaĵo por kulti prapatrojn. Ĝi estas fama pro siaj harmonia aranĝo kaj delikata ornamo. La tuta konstruaĵo ornamita per skulptaĵoj lignaj, ŝtonaj, brikaĵoj, argilaj kaj feraj havas riĉajn enhavojn, kiuj koncernas ne nur rakontojn pri antikvaj homoj, sed eĉ pejzaĝon de Gŭangdong kun lokaj gustoj.

En Kantono troviĝas multe da revoluciaj objektoj modernaj kaj nuntempaj, ekz., la Monumento al la Kontraŭbritaj Herooj Martiriĝintaj en la Opia Milito en la 40-aj jaroj de la 19-a jc. La Tombo de la 72 Martiroj, kiuj oferis sian vivon en la insurekcio por renversi la registaron de Ĉing-dinastio en 1911. Tie staras ankaŭ Memorhalo de Dr. Sun Jatsen, granda demokratia revoluciulo de Ĉinio, kaj la malnova sidejo de la Seminario de Kamparana Movado, kie Maŭ Zedong, Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj kulturis kamparanajn kadrojn. Ili ĉiuj ĝuas altan estimon de posteuloj pro sia granda kontribuo al la prosperigo de Ĉinio.


Kantono nomiĝas ankaŭ Flora Urbo. Estas plezure promeni sur Ĝuhaj-placo en la centro de la urbo. Okulfrapaj estas flame ruĝaj floroj de la kapokarboj kiuj estas nomitaj floroj de la urbo. Komforte estas promeni sur stratoj kaj rigardi belegajn florzvojn sur balkonoj de la domoj ĉe strato. La urbo indas la nomon Ĝardena Urbo. En la tempo de printempa florfoiro la tuta urbo dronas en flora maro. Sur la Perla Rivero trapasanta la urbon iras tien kaj ĉi tien ŝipoj kun diversspecaj envazaj floroj. Sur stratoj staras multe da bretaroj de floroj, sur kiuj estas metitaj bukedoj kaj envazaj floroj. La stratoj vere indas la nomon "5-

kilometra Flor-strato". Ravate de la orienta festa atmosfero, oni kun granda ĝojo konkure elektas freŝajn florojn por renkonti printempon. La homoj tenas bukedojn super la kapo kaj portas florzvojn sur la ŝultro. Tiam la homfluo aspektas kiel bela florriviero. Kiel poezia moro!

En Ĉinio cirkulas la diro: "Estas plej bone manĝi en Kantono." Tie preskaŭ ĉiuj specoj de birdoj, bestoj kaj fiŝoj povas fariĝi frandaĵoj sur la tablo post prilaborado de la kapablaj kantonaj kuiristoj. Laŭ statistiko, en Kantono estas 5 000 specoj de pladoj kaj 800 specoj de kukoj, kiuj okupas la unuan lokon en la tuta Ĉinio. Hodiaŭ en Kantono estas 25 grandaj restoracioj kun kvieta medio, komfortaj sidlokoj kaj perfekta kuirarto. Rilate la mezgrandajn kaj malgrandajn restoraciojn, te-trinkejojn kaj manĝaĵo-vendejojn kaj butikojn, kiuj vendas speciale viandaĵojn de sovaĝbestoj, fiŝaĵojn kaj pladojn el legomoj, ili troviĝas ĉie en la stratoj. La kanton-anoj kutimiĝas manĝi kukojn trinkante fortan teon.

En la lastaj jaroj la turisma servo de Kantono jam pliboniĝis. Nun en la urbo funkcias 370 hoteloj kun kompare altklasaj dek mil ĉambroj kaj pli ol 3 000 taksioj. En la hotelo Blanka Cigno, Ĉina Vin-Domo, Orienta Hotelo, hotelo Liŭhŭa kaj aliaj grandaj hoteloj oni povas kontaktiĝi rekte kun Hongkongo, Aŭmen kaj aliaj lokoj en la mondo per telefono kaj aliaj rimedoj de telekomunikado. Kantono nun plenenergie plibonigas siajn turismajn ekipaĵojn, pluaparte ekspluatas siajn turismajn kondiĉojn kaj konstruas novajn turismajn punktojn por fervore akcepti la turistojn el ĉiuj anguloj de la mondo.





*Ĉe la lago Liühŭa*



*Tetrinkejo en taj-a stilo*




*Flor-strato en pluva nokto*

*Silkaĵoj kaj brodaĵoj tre bonvenaj al turistoj*







*Eksterlandaj turistoj sur flor-strato*

*La Ĉina Restoracio nove konstruita*





**FOTOJ FARITAJ  
DE E-ISTOJ**

*En suda Ĉeĥoslovakio*  
de **ZVONKO TABORSKY** (Jugoslavio)

*Sunsubiro en la brazila internlando*  
de **EMILIO JEFERSON ULBRICH** (Brazilo)





**Tarifo:** 1 internacia respondkupo por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili. Bonvolu sendi la intern. resp. kup. nepre rekte al EPC-redakcio, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

\* Eldonejo & Librejo Sonorilo havas Eldonan Fondaĵon. En 1985 ni volas eldoni ankaŭ librojn. Jen kelkaj titoloj: "Murdo pro malespero", "Ora abelo" kaj "Malnova legendo". Ni dankas ĉiujn personojn kiuj jam donacis monon al nia Eldona Fondaĵo. Vi povas donaci monon al nia eldona fondaĵo per nia poŝtĉekkonto: Bruselo 000-0152140-44 je nomo de Eldonaĵo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Vilrijk-Antwerpen, Belgio, kun mencio de: donaco al Eldona Fondaĵo.

\* Dez. kontaktiĝi tutmonde pri Kung-fu-o, karateo ktp., 19-jara junulo Ts. Batzaya, Postrestante 13, C.P.O. Ulan-Bator, Mongolio.

\* Jose Manuel de Almeida, Rua Frei Brandao, 109, P 2460 Alcobaca, Portugal, dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj.

\* Sep jugoslavaj lernantoj esperantistaj dez. kor. kun samaĝuloj el Ĉeĥoslovakio kaj la tuta mondo. Jen la adresoj:

Mateja Popid, 63250 Rogaska Slatina, Cesta na Boc 24;

Sasa Popid, 63250 Rogaska Slatina, Cesta na Boc 24;

Karli Lipnik, 63250 Rogaska Slatina, Irje 46A;

Bostjan Golez, 63241 Podplat, Spodnja Kostrivnica;

Boris Vuzen, 63250 Rogaska Slatina, Rresernova 35;

Kristijan Braĉun, 63250 Rogaska Slatina, Presernova 34;

Cujez, 63250 Rogaska Slatina, Celjska 49.

\* Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), komencis agadi. Ĝi nun serĉas pliajn kunlaborantojn (komercistojn, ekonomiistojn el komerco, industrio, bankaj kaj asekuraj instancoj, universitatoj, k.s.). La oficiala fondkunveno okazos dum la U.K. en Aŭgsburgo. Petu informojn, sendante 3 irpk-ojn: Fakgrupo Komerca, Postbus 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

\* Du fratoj Petro (20j.) kaj Paŭlo (17j.), Str. Stacyjna 55/18, PL-08-400-Garvolino, Pollando, deziras korespondi kun ĉin(in)-oj pri kemio, sporto, naturo kaj muziko.

\* 24-jara Chen Xian-hong (teknikisto), dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, speciale pri radio kaj elektra lum-origino. Adreso: Sha-shi Shi Ying Guang Deng Chang, Sha-Shi, Hu-bei, Ĉinio.

\* 39-j. Mezlern.-instruisto, dez. kor. kun esperantist(in)o el Pekino pri literaturo, Esperantomovado, pedagogio. Intencas viziti la UK 1986. Michael Scherm Von-Thurheimstr. 47, D-7912 Weissenhorn, FR Germanio.

\* 17-jara Gaspar Levente, volas korespondi kun samaĝa knab(in)o. Adreso: 4200 Gheorgheni, Cart. Bucin, BL.9 Ap.8 Et. II, Harghita, Rumanio.

\* 27-jara Valerijus Rudzinskas, Jurbarko raj. 234442 Stakiai, USSR, Lithuania, dez. kor. kun samideanoj el Ĉinio.

\* 15-jara lernantino Katiuska Fedora Trebol A., Calle Dr. Morales 22 Nr. le, Villa de Cura, Venezuelo.

\* 14-jara Nagy Akos, 4193 Ulies, Str. Principala Nr.50, Jud. Harghita, Rumanio, dez. kor.

\* 43-jara Josef Gasiorowski, ul. Wyszynskiego 20A/20, 87-100 Torun, Pollando, volas korespondi kun aziaj samideanoj.

\* 37-jara okcidentgermana programisto deziras korespondi kun geamikoj el Ĉinio. Hobioj: montogrimpado, padelkanotado, skimigrado, fotografi kaj vojaĝi. Intereso: politiko, psikologio, ekologio. Adreso: Michael Woter, Weberstr. 16, D-6000 Frankfurt 1, West-germany.

\* 19-jara hungara fraŭlino Nagy Terez, Belso 1233, Joseni, 4206 Harghita, Rumanio, ŝatas korespondi tutmonde hungare kaj esperante pri muziko, sporto kaj literaturo.

\* 17-jara Porlik H. Maria-Magdolna, Bako 1930, Remeteo 4212 Harghita, Rumanio, dez. kor. kun amikoj ĉefe el Hungario kaj Ĉeĥoslovakio pri diversaj temoj.

\* 16-jara knabino Cawin Jwona, ul. Reymonta 3, 12, 83-400 Koscierayna, Gdanskie, Pollando, dez. kor. kun knab(in)o.

\* Gerbert Kinzel, DDR 7270 Delitzsch, deziras korespondi kun ĉina fervojistoj esperantistoj.

\* S-ino Mariola Katerina Starczewska, PL. 89-333 Osiek n not, Str. Bohateraw 29, Pollando, deziras korespondi kun knab(in)-oj aŭ junaj geedzoj.

\* 30-j. pianisto, fraŭlo, dez. amikojn pref. el Hindio, Sove-tunio, Ĉinio, landoj tiel malproksime de Usono. Andrew Zarchy, 11034 Wrightwood Pl., Studio City, California 91604, Usono.

# Esplorado de "reĝlando de raraj birdoj"

Fotoj de SIN HŬA



*Eksterlandaj ornitologoj observantaj rarajn birdojn apud la lago*




*Pelikano, giganta inter la migraj birdoj sur la lago*




*Eksterlanda kaj ĉina ornitologoj dissekcas grupon por trovi la kaŭzon de ĝia subita morto kaj alpreni rimedojn por protekti la aliajn.*

Laŭ invito de la Ĉina Ministerio de Forstokulturo, 11 famaj ornitologoj el Usono, Kanado, Hispanio kaj Svedio, gvidate de d-ro George W. Archibald, prezidanto de la Internacia Gruo-fonduso, venis observi kune kun ĉinaj kolegoj blan-

*Belaj kaj kvietaj cignidoj sur la lago*







*Blankaj grupoj super Pojang-lago*



kajn grupojn sur Pojang-lago en Ĝjangŝji-provinco, orienta Ĉinio, de la 10-a ĝis la 22-a de januaro 1985. Ili trovis ne nur 1 350 blankajn grupojn, sed ankaŭ 1 165 blank-okcipitajn

grupojn, 105 blank-kapajn grupojn kaj multajn aliajn specojn de migraj birdoj, kiaj cignoj kaj pelikanoj, kiuj venis travintri sur la lago.

Pojang, la plej granda dolĉ-

akva lago en Ĉinio, fariĝis mondfama "reĝlando de raraj birdoj" pro tio, ke en 1984 oni trovis tie grupon el 840 blankaj grupoj, la plej grandan en la mondo.

*Nedisigebla paro da grupoj ĉe la lago*



# La unua gazeto eldonata de ĉinaj geknaboj

Fotoj de LÜO ĜIMING (8-jara)

“Kiam mi legis en ĵurnalo informon, ke naskiĝis la unua semajna gazeto ‘Malgranda Mastro’ eldonata de infanoj, mi eksaltis de ĝojo. Mi iam pensis: se en Ĉinio troviĝas multaj geknaboj, ĉu ili ne povas eldoni sian propran gazeton? La deziro finfine realiĝis.”


Supre estas citaĵo el la letero de Hu Ĝunĝun al “Malgranda Mastro”. Kiam la semajna gazeto “Malgranda Mastro” estis oficiale ekaperis la 15-an de julio 1983, en la tuta lando sennombraj geknaboj eldiris la similajn vortojn same kiel Hu Ĝunĝun.

La stereotipa semajna gazeto “Malgranda Mastro” estas iniciatita de geknaboj de la Ĉangninga Geknaba Domo de Ŝanhajo kaj distribuata tra Ĉinio. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la domo servis kiel “dua lernejo” de geknaboj. Post lecionoj ili kolektiĝis ĉi tie kaj okupiĝis pri diversaj artaj kaj sportaj aktivadoj. En aprilo de 1983, helpate de instruisto Ĝu Ĝjeŝi de la domo, ili komencis preparadon de la gazeto. La 42-jara instruisto Ĝu jam dediĉis pli ol 20 jarojn al la eduka afero. Laŭ karaktero de geknaboj, li zorge ellaboris laborproceson por redaktado kaj instruis al ili intervjuadon, elektadon de artikoloj, kompiladon kaj paĝoaranĝadon. Li kaj geknaboj kune interkonsiliĝis kaj nomis la semajnan gazeton “Malgranda Mastro”. La gazeto celas disvolvi la intelekton, kulturajn kapablon de la geknaboj por ke ili poste estu kompetentaj mastroj kaj taŭgaj konstruantoj de la lando.

Ekzempleroj de “Malgranda Mastro”



Malgrandaj intervjuistoj en fabriko



## REDAKTORETO KAJ VERKANTETO

La redaktoroj de “Malgranda Mastro” devas esti malpli ol 15-jaraj. La redakcio havas ĉ. 40 redaktoretojn kun meza aĝo de 12 jaroj. El ili la plej juna estas nur 7-jara. Ili, venintaj de 20 mezlernejoj kaj elementaj lernejoj de Ŝanhajo, estas akceptitaj post ekzameno de la redakcio. La redakcio konsistas el sekcioj de novaĵ-raportado, lernado,



spertinterŝanĝado, scioj, kulturo kaj arto kaj korespondado. La redaktoretoj ĉiusemajne unufoje iras labori en la redakcio post lecionoj. Antaŭtagmeze de dimanĉo ili havas lecionon pri ĵurnalistumo donitan de direktanta instruisto de la redakcio. Ili havas fortan devokonscion pri la gazeto. Antaŭ eldoniĝo de la gazeto, gvidate de la malgranda ĉefredaktoro Ŝen Jimin, ili iris al la distrikta registaro kaj vizitis la distriktestron por akiri ties subtenon. En tre mallonga tempo ili vizitis iujn eldonejojn kaj verkistojn de infanaj legaĵoj kaj famajn personojn de la socio por akiri iliajn aŭspiciojn.

La redaktoretoj instalas laŭ sia intereso rubrikojn "Nia Verko", "Malgranda Mastro de Lernejoj", "Ĝardeneto", "Ĉagreno", "Eksperimento" kaj "Libroamanto". Krome ili ofte aranĝas intelektan, pentran kaj kaligrafian konkursojn en la gazeto. Pli ol 70% de la artikoloj de la rubrikoj estas adresitaj de lernantoj de mezlernejoj kaj elementaj lernejoj de nia lando. La artikoloj plene spegulis iliajn ideojn. Ekzemple, en la rubriko "Ĉagreno" estas artikolo "Ĉu batado povas talentigi infanojn?" verkita de 12-jara knabino. Ŝi plendis en sia artikolo ke ŝi suferis batadon kaj insultadon de la gepatroj pro nebonaj notoj en ekzameno. Ŝi opinias ke batado povas vekti ĉe la infanoj nur antipation kaj ne saĝigi ilin. Ŝi esperas, ke la gepatroj ne batos nek insultos siajn infanojn, se ili ne akiras bonajn notojn en ekzameno. Tiaj artikoloj, kiuj apelaĉiis por infanoj, kortuŝis multajn gepatrojn. En la rubriko "Nia Verko" estas artikoloj, kiuj montris de diversaj flankoj iliajn impresojn pri la gepatroj, instruistoj kaj aliaj. La redakcio havas grupon da recenzistoj. Plejparto de la artikoloj estas recenzita de



*Pentristinoj de la redakcio en pentrado por la gazeto*



*Redaktoretoj en laboro*

koncizaj kaj simplaj komentarioj.

Por ke pli multaj geknaboj kontribuu por "Malgranda Mastro", la redakcio premias bonajn verkojn. La redakcio senĉese ricevas sugestojn de la legantoj. Iu grupo de la kvara klaso de elementa lernejo ne nur proponis ke la gazeto multe aperigu enigmojn, sed ankaŭ sendis al la redakcio dikan libron de infanaj enigmoj.

### STARTI DE ĈI TIE

La 14-jara ĉefredaktoro Ŝen Jimin estas unu el la plej fruaj laborantoj de la gazeto. Ŝi, pri-pensema kaj atentema, laboras zorgeme kaj serioze, kaj ĉiam volantas helpi la kunuletojn, kiam tiuj frontas al malfacilo.

Ŝi bone memoras la pasintaĵojn de siaj kolegoj. Ekzemple la 10-jara redaktoro U Ĉen venis al la redakcio akompanate de siaj gepatroj. Fotisto Ŝen Ĵen estis "malatentemulo" kaj ofte ne trovas bezonatajn fotojn pro malorda dismetado. Foje fotisto Lŭo Ĝiming fuŝis la filmon pro difektiĝo de la ingo por fulmolumilo kaj dolore ploris. La 8-jara raportisto Su Haŭfan disponas lertan esprimpovon en verkado, tamen li estis malkuraĝa antaŭ nekonatuloj. Kiam li unuafoje intervjuis distriktestron, li faris demandon en apenaŭ aŭdebla voĉo, kaj tuj ruĝiĝis pro hontemo. Sed baldaŭ, ili lertiĝis post kelk-tempa kunlaborado. La 11-jara vicĉefredaktoro Ĝang Ŭej foje akiris unuan premion en



*Raportistoj de la Ŝanhaja Popola Radiostacio intervjuas laborantojn de la "Malgranda Mastro".*



*Vicĉefredaktoro U Ĉen (dekstre) prezentas la gazeton al sveda ĵurnalisto.*

konkurso de verkado de la distrikto kaj pro tio li estis iom fiera. Poste, kiam li legis verkojn de diverslokaj geknaboj, li komprenis, ke multaj infanoj estas pli superaj ol li, kaj li decidis pli multe lerni.

Se vi iras al la redakcio, vi certe propraokule vidas la redaktoretojn diskutantajn pri aperigebleco de iu verko aŭ ĝusta uzo de iu vorto aŭ interpunkcio. Pridisputado ofte estas intensa. Iuj zumas melodion, tenante kantoslipojn senditajn de geknaboj. Redaktoretoj pri belarto pozas antaŭ spegulo kaj pentras por ilustritaj artikolojn. La ridema dikuleto U Ĉen jam fariĝis vicĉefredaktoro kaj povas sendepende kompili, korekti kontribuojn kaj intervui. Foje li vizitis 8-jaran pentristinon Ŭang Jani, kiu estas tre timida kaj diris nenion. U Ĉen do distriĝis kune kun ŝi. Kiam ŝi liberiĝis de timo kaj ekparolis al li, li jam pretigis en si la artikolon.

Foje redaktoretoj vizitis iun farmacian fabrikan de Ŝanhajo kaj sinjorino Zŭo akceptis ilin. Aŭdinte ke la geknaboj volas informiĝi pri produktado de infanaj medikamentoj, Zŭo kun-tiris siajn brovojn kaj plendis: "Vi ja estas tro junaj kaj ne po-

vas kompreni mian konigadon." Tamen ŝi devis akcepti ilin. Ili sidiĝis kaj prezentis seriojn da demandoj. Kiam Zŭo respondis al ili, ili serioze notis, kaj du fotistetoj kodakis jen tie jen ĉi tie. Zŭo baldaŭ konfidis ilin kaj akompanis ilin viziti laborejojn kaj faris detalan konigon. Ĉe la adiaŭo, ŝi varme diris: "Bonvenon al vi venontfoje.

### **SUBTENO DE DIVERSAJ SFEROJ DE LA SOCIO**


En la gazeto "Malgranda Mastro" oni ofte vidas anoncojn pri ilia danko al sociaj subtenoj. Sube estas anoncoj el la rubriko "Zorgo de Maljuna Generacio" en la unuaj tri numeroj de 1984: "En la 22-a de januaro ni ricevis 12 jŭanojn, kiujn sendis al ni instruistino Ŝjaŭ Janna de la eduka fakultato de la Ljaŭning-a Instruista Instituto. La monon ŝi ricevis kiel premion pro sia pluslaboro en la pasinta jaro." "Hŭang Zuĝji de la Uŝjan-a filio de Ĝjangsu-provinco de la Ĉina Popola Banko sendis 100 jŭanojn al nia gazeto." "En la Printempa Festo geonkloj de la Ŝanhaja telefonia Buroo instalas specialan telefonon por nia redakcio spite venton kaj neĝon." "Fama filatelisto Baŭ Ziĝjun sendis al la redakcio kompletan da specialaj

poŝtmarkoj kun la nacia emblemo, kiu estas la unua poŝtmarkoserio emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Li petas nin donaci ĝin al verkintoj."

Post sia fondiĝo "Malgranda Mastro" akiris subtenojn de diversaj flankoj de la socio, eĉ iliaj oficejaj instrumentoj estas senpage faritaj de junaj laboristoj de iuj fabrikoj. La intervjuo, aranĝado de artikoloj, fotado, ilustraĵo kaj reviziado estas plenumataj de la geknaboj mem, dum la distribuado, financa administrado kaj presado estas farataj helpe de iuj edukaj kaj eldonaj unuoj. Profesoroj de ĵurnalismaj fakultatoj de iuj universitatoj, redaktoroj de iuj famaj ĵurnaloj kaj gazetoj okazigis ĵurnalistan kurson por lertigi la malgrandajn redaktorojn. Multaj maljunaj verkistoj por infana literaturo ofte skribis al "Malgranda Mastro" kaj respondis iliajn demandojn.

Iu maljuna redaktoro diris: "Geknaboj eldonas gazeton, tio estas senprecedenca en Ĉinio. Klopodu, 'Malgranda Mastro!'" Tiu gazeto estas tre ŝatata de la ĉinaj geknaboj. En duonjaro la distribua kvanto kreskis de 12 000 ekzempleroj al 20 000 en 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando.





*Mi grandiĝis!*

## Vivo de ĉinaj infanoj

Fotoj de SUN JI

*Komenciĝis la porin-  
fana programero!*

*Por fariĝi kuracisto en la estonteco*





*Ni mem ordigas la liton.*

*Mi akompanas la  
frateton hejmen.*

*Kia bela bildo!*







*Kiu estas pli forta?*



Nia ĉinlingva kurso pro ia kaŭzo haltis en la pasintaj kvar monatoj kaj refunkcios ekde tiu ĉi numero. Laŭ peto de iuj legantoj ni instruos la parolan ĉinan lingvon anstataŭ la skriban por faciligi la lernadon.

Por ke oni ĝuste prononcu ĉinajn ideogramojn, ni faris pasintjare krompaĝon de "Ŝlosilo al la Han-lingva Fonetika Alfabeto" kaj grafikaĵon pri la kvar tonoj. Ni pretas sisteme publikigi la han-lingvajn fonetikajn literojn kaj konigi iliajn prononcon kaj ortografion, tiel ke oni povos sin ekzerci dum legado de teksto. Ni informiĝis, ke en la unua duono de la venonta jaro Radio Pekino eble funkciigos parolan kurson de han-lingvo kaj tiam oni povos lerni ĝin kun helpo de nia kurso. Kiam kondiĉoj permesos, ni surbendigis la han-lingvan fonetikan alfabeton kaj ĝian dialogon.

LA RED.

**第十二课 Dekdua Leciono**

*La han-lingva fonetika alfabeto*

1. Komencaj konsonantoj de la han-lingva fonetika alfabeto  
 Bilabialoj: b p m  
 Labiodentalo: f  
 Dentaloj: d t n l  
 Velaroj: g k h  
 Gingivaloj: j q x  
 Frikativaj dentaloj: z c s  
 Frikativaj gingivaloj: zh ch sh r

2. Vokaloj de la han-lingva fonetika alfabeto  
 Simplaj vokaloj: a o e i ü u er  
 Kunmetitaj vokaloj: ia ie iao iou (-iu) ai ei ao ou ua uo uai uei (ui) ue  
 Vokaloj sekvataj de nazalaj konsonantoj: an en ang eng ong uan uen (-un) uang ueng üan ün ian in iang ing iong

3. Han-lingvaj silaboj  
 Han-lingva silabo konsistas el komenca konsonanto, vokalo kaj tono. La komenca konsonanto antaŭas al la vokalo, kaj ĉiu silabo estas prononcata per certa tono. Vidu tã: t estas komenca konsonanto, a — vokalo kaj v — tono.

Ĉiu silabo havas ĝenerale unu komencan konsonanton. Ĉe ĝi estas simpla aŭ kunmetitaj vokaloj kun aŭ sen konsonanto.

Silabo povas havi nur vokalon sen komenca konsonanto, kiel a (啊) kaj (喔), sed ne ekzistas silabo sen vokalo.

**LA HAN-LINGVA FONETIKA ALFABETO**

presita formo	manskribita formo	nomo	presita formo	manskribita formo	nomo
A a	A a	[a]	N n	N n	[ne]
B b	B b	[pe]	O o	O o	[o]
C c	C c	[ts'e]	P p	P p	[p'e]
D d	D d	[tɛ]	Q q	Q q	[tɕ'iou]
E e	E e	[ɤ]	R r	R r	[ar]
F f	F f	[ef]	S s	S s	[es]
G g	G g	[kɛ]	T t	T t	[t'e]
H h	H h	[xa]	U u	U u	[u]
I i	I i	[i]	V v	V v	[ve]
J j	J j	[tɕie]	W w	W w	[wa]
K k	K k	[k'e]	X x	X x	[ɕi]
L l	L l	[el]	Y y	Y y	[ja]
M m	M m	[em]	Z z	Z z	[tse]



# Mia patrino

de HE GÜANG



**M**ORGAŬ estos la naskiĝtago de mia patrino. Kion mi devas donaci al ŝi?

Mi senbrue paŝis al mia patrino. Ŝi kudris veston por mi, kun kapo mallevita. Mi alpinglis ruĝan floron al ŝia brusto kaj ŝi ekridetis. Ŝia rideto estis plena de kontenteco, fiereco kaj ĝojo. Ho! mi deziras por ĉiam teni ŝian afablan ridon en mia memoro.

Ankoraŭ en mia infaneco mi fiere diris al aliaj: "Mia patrino estas la plej bela en la mondo." Kaj poste, kiam mi fariĝis knabo, mi diris: "Mia patrino estas la plej granda en la mondo." La tempo pasis tre rapide. Baldaŭ

venos la 50-jara datreveno de ŝia naskiĝo. Kion mi devas donaci al la bela kaj granda patrino? Mi pensis kaj pensadis. Ho, jes, mi donacu al ŝi senfinajn bondezirojn!

Iuvespere mia patrino trikis lanveston por mi en la malhela lamplumo. Subite mi rimarkis, ke ondoformaj sulketoj aperis sur ŝia frunto, kiu estis glata antaŭe. Unu, du, tri, — mi eĉ povis elkal-kuli ilin. Al mi ne plaĉis tiuj sulketoj. Kiel mi volus tuj ilin forigi per miaj manoj! Precipe kiam mia patrino, kun brovoj kuntiritaj, dronas en meditado, mi povas klare vidi sulketojn ĉe

ŝiaj okulanguloj. Tamen, ĉu mi vere povas forigi ilin? Tiuj sulketoj spegulas ŝiajn meritojn kaj noblecon. De mia infaneco mi multe respektas la patrinon. Mi kuraĝas diri, ke mia patrino posedas ĉiujn virtojn de la virino. Sed ŝi ne estas serioza virino. Iafoje ŝi ŝercas kun ni, tiel ke en mia familio ne estas generacia interspaco, kaj la rilato inter la bopatrino kaj bofilino estas treege harmonia. Ĉio ĉi tio faras min fiera, donas al mi multe da profito kaj plifirmigas la fundamenton de mia estonta konduto.

Ho, mia patrino, mi refoje diras: "Mi amas vin por ĉiam."



Nerevenigebla de ŬANG ĈUNŜENG

## Rigardi malproksimen

de ZENG GŬO

*Kiam mi estis juna, en hazardo  
la kapon mi eklevis en la oceano  
de l'vivo, por rigardo al la aĝo sesdekjara,  
kvazaŭ haveno fora de fremdlando.*

*Tra uragano, tra ondaro,  
jen mi alvenas al ĝi. Je kapturino  
mi vidas mian aĝon de junulo  
kvazaŭ l'hejmlokon fore en nebulo.*

### RIMARKINDA SUKCESO EN LA NACIA EKONOMIO DE ĈINIO EN 1984

En la unua tagdeko de marto la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio donis informojn pri la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo en 1984. La totala socia produktov valoro de la pasinta jaro estis 1 283.5 miliardoj da jŭanoj, je 13% pli multe ol tiu en 1983, kaj la totala produktov valoro de industrio kaj agrikulturo estis 1 062.7 miliardoj da jŭanoj, je 14.2% pli multe ol tiu en 1983; la nacia enspezo en 1984 estis 548.5 miliardoj da jŭanoj, je 12% pli multe ol tiu en 1983. Pri la totala socia produktov valoro, la totala produktov valoro de industrio kaj agrikulturo, la nacia enspezo, la produktokvanto de 13 ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj kaj la produktokvanto de 89 ĉefaj industriaj produktaĵoj oni plenumis aŭ superplenumis la planon de la jaro 1984.

La buroo diris, ke la nacia ekonomio de Ĉinio en 1984 ne nur disvolviĝis kun rekorda rapideco, sed ankaŭ sin karakterizis per daŭra, stabila kaj harmonia kresko. Dank' al la produkta disvolviĝo, prosperas la enlanda merkato, vigliĝas ekstera komerco, daŭre pliboniĝas la popola vivo kaj progresas la spirita konstruado.

### POR FACILIGI VOJAĜON DE FREMDLANDANOJ EN ĈINIO

Por faciligi vojaĝon de fremdlandanoj en Ĉinio, la ĉina registaro decidis malfermi ekde la 15-a de februaro aliajn 69 urbojn kaj guberniojn al la fremdlandanoj. Ĉi tiuj povas vojaĝi al tiuj lokoj sen antaŭpermeso kaj vojaĝatesto.

Ĝis 1984 la ĉina registaro jam malfermis 31 tiajn urbojn kaj guberniojn. Kun la disvolviĝo de la situacio Ĉinio malfermos ankaŭ pliajn tiajn urbojn kaj guberniojn.

### 41 ĈINAJ EKSPORTAJ VAROJ PREMIITAJ EKSTERLANDE

La 41 premiitaj ĉinaj varoj estis produktitaj de pli ol 50 entreprenoj. Ili havas bonan kvaliton, vastan merkaton kaj grandan konkurenc-forton. Ekde 1979 la ĉina eksporta komerco daŭre kreskas, meznombro je 16.5% pli multe ĉiujare.

### INTERFERAĜO DE LA HOMA GENOTIPO A SUKCESE FARITA

Ĉinio sukcese faris per nova genotekniko la unuan klinikan medikamenton — interferaĝon de la homa genotipo A, kiu estis jam ekspertizita en februaro en Pekino. La interferaĝon preparis sciencistoj kaj teknikistoj de la Virusa Instituto de la Ĉina Preventmedicina Centro kaj la Ŝanhaja Biokemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, gvidate de profesoro Hoŭ Junde kaj vicprofesoro Liŭ Ŝinjŭan. Tio estas granda progreso de nova biotekniko.


La interferaĝo estas kontraŭvira substanco, kiun sekrecias ĉeloj de homa korpo. En Ĉinio vira malsano nun ankoraŭ grade minacas la sanon de homoj, kaj

oni ankoraŭ ne trovis efikan kurac-metodon. Kiel montris praktika sperto enlanda kaj eksterlanda en la lastaj dek jaroj, interferaĝo havas certan kuracan efikon ne nur sur virusan malsanon, sed ankaŭ sur iujn malignajn tumorojn. Sed natura interferaĝo, farita el ĉeloj de homa sango, estas malmulta, multekosta kaj malvaste uzata. Se oni povas produkti per genotekniko grandan kvanton da interferaĝo, la homaro espereble venkos virusan malsanon.

### SCIENCA EKSPERIMENTO PRI ANALOGA ALTEBENAĜA VIVO EN ŜANHAJO

Lastatempe la Ŝanhaja Fiziologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris sciencan eksperimenton pri vivo en analogo medio de 4 500 metroj super la marnivelo. Ok junaj sciencistoj faris tian eksperimenton. Ili pasigis 14 tagojn kaj noktojn en malaltatmosfera eksperimenta kajuto 9 metrojn longa kaj 3 metrojn larĝa. Scienc-esploretoj kaj kuracistoj kontrolis la funkcion de iliaj cerbo, pulmo, koro kaj kardiovaskuloj kaj ekzamenis iliajn korpan ŝarĝon, nutradon kaj dormadon sur "altebenaĝo".

*Esploristoj kaj kuracistoj kontrolas la funkcion de la pulmoj kaj faras kardiovaskulan eksperimenton al ekzamenato.*






Tiu eksperimento pri homkorpa funkcio en analoga oksigen-manka altebenaĵa medio celas daŭre esplori la adaptiĝemon, laborkapablon kaj ŝanĝiĝon de fiziologia funkcio de homo sur altebenaĵo.

### LA UNUA HOM-PORTA TERMOBALONO DE ĈINIO

En la unua tagdeko de februaro la unua hom-porta termobalono de Ĉinio sukcese leviĝis en Nankino. La balono havas horizontalan diametron de 17 metroj, altecon de 20 metroj kaj volumenon de ĉ. 2 500 kubmetroj. Sub ĝi pendas liana korbo por 5-6 homoj. Sur la korbo estas propano-hejtilo. La balono povas leviĝi 10 000 metrojn. Ĝi estas

*Leviĝas la unua hom-porta termobalono de Ĉinio.*



*Du Hongling (virino) kaj Jang Sinhŭa prezentas la duopan dancon "Pirato".*

uzata ne nur en sporto, sed ankaŭ en turismo, aera fotado, akiro de atmosfera specimeno, urba prospektorado, reklamo k.a.

### UNUA ĈINA BALETA KONKURSO

En februaro la baleta fakultato de la Pekina Danca Instituto kaj la Bejĝo-a Eldonejo de Son-kaj Bild-produktaĵoj kune okazigis la unuan ĉinan baletan konkurson. 72 gebaletistoj partoprenis en la tri-taga konkurso en Pekino. Du Hongling el la Ŝanhaja Baleta Trupo, Oŭ Lu el la Pekina Danca Instituto, Feng Jing el la Centra Baleta Trupo, Ŭang Ŝan kaj Li Ĉinseng el la Pekina Danca Instituto ricevis la unuan premion respektive de duopa kaj unuopa dancoj de la plenaĝula grupo kaj de la geknaba grupo. Honoran premion ricevis Ŭang Cajĝjun, Ŭang Ĉjifeng, Jang Sinhŭa, Ĝang Ŭejĉjang, Gŭo Pejhuĵ, Tang Min, Li Jing kaj Ŝju Gang, gajnintoj de premio en internaciaj baletaj konkursoj.

### ORAN KAJ ARGENTAN MEDALOJN AL DU ĈINAJ MEZLERNEJANOJ

En februaro la Nankina Geknaba Societo de Kaligrafiaĵoj kaj Pentraĵoj ricevis oran kaj arĝentan medalojn de la 6-a Internacia Pentraĵa Konkurso de Geknaboj kaj Gejunuloj okazigita en Finnlando. La du medaloj estis donacitaj respektive al Li Jiĝi, lernantino de la Nankina 67-a Mezlernejo, pro ŝia lignogravuraĵo "La Paca Parko de Nankino" kaj Ĝu Ping, lernantino de la Nankina 10-a Mezlernejo,

pro ŝia lignogravuraĵo "Moĉoŭ-lago". Ili lernas ankaŭ en la trejna kurso de la nomita societo.

### LA OPERO "CARMEN" DENOVE SUR SCENEJO DE PEKINO

La opero "Carmen" reaperis sur scenejo de Pekino en la lasta printempo kaj ricevis varman laŭdon de spektantoj. Ĝi estis provludita, antaŭ tri jaroj, de la Centra Opera Trupo de Ĉinio sub la direktado de franca artisto laŭ la interkonsento de ĉina kaj franca kultura interŝanĝo. Tio vekis grandan eĥon en kaj ekster la lando. La franca disko-kompanio Stil surdiskigis "Carmen" ludatan de la Centra Opera Trupo de Ĉinio kaj la disko ricevis premion de Akademio Charles Cros de Francio. Ĉi-foje oni speciale invitis ne nur eminentan junan aktoron Ŭang Hujjing, kiu siatempe ludis Carmen, faris prezentadon, sed ankaŭ Ljang Ning kaj Ĝang



*Sceno el la opero "Carmen"*


Manhŭa, kiuj ricevis premion en la internacia muzika konkurso en 1984, ludi Carmen.

*Li Ning kaj Ĝu Ĝjanhŭa*

### 10 EMINENTAJ MONDAJ SPORTISTOJ ELEKTITAJ DE ĈINIO

La Ĉefurba Stala Kompanio de Pekino, la Centra Televida Stacio de Ĉinio kaj redakcio de la gazeto "Nova Sporto" kune iniciatis la elektadon de 10 eminentaj mondaj sportistoj por 1984. La rezulto de la elektado publikiĝis en februaro de 1985 en Pekino. La elektitoj estas Carl Lewis (usona atleto), Michael Gross (naĝisto de FR Germanio), Li Ning (ĉina gimnasto), Michel Platini (franca piedpilkisto), Sergei Bubka (sovetia atleto), Ecaterina Szabo (rumana gimnasto), Naim Suleimanov (bulgara halterlevisto), Edwin Moses (usona atleto), Daley Thompson (brita atleto) kaj Ĝu Ĝjanhŭa (ĉina atleto).

La elektadon partoprenis 400 000 sportaj amatoroj, inter kiuj estis amatoroj de Usono, Belgio, Aŭstralio, Singapuro, la Korea Demokratia Popola Respubliko kaj Hongkong.





# NORD-TIBETA STEPO

de GE LAJ

Fotoj de ĈENG MINGGUJ

Sub la neĝ-kovrita Tanggula-montaro abunda akvo nutras sukajn herbojn kaj ĉarmajn florojn. Sur la vasta herbejo punktita de nigraj, blankaj kaj koloraj jurtoj lantaj grasaj gruntbovoj kaj ŝafoj, galopas ĉevaloj: la gregoj moviĝas sur la herbejo kiel nuboj en la ĉielo. Vilaj bovidoj, ŝafidoj

kaj ĉevalidoj gaje distriĝas en herbaro. Alflugas jen melodio de fluto, jen gaja pastoralo. Jen la bela nord-tibeta stepo.


La nord-tibeta stepo estas la plej grava paŝtregiono de Tibeto. La regiono inkluzivas 11 guberniojn (inkl. du administrejojn de

gubernia nivelo) kaj unu urbeton. Tie loĝas ĉ. 240 000 tibetanoj. En 1959 la tuta paŝtregiono havis nur iom pli ol 2 milionojn da brutoj. Sed post 25 jaroj, la nombro de la brutoj jam kreskis ĝis 8 849 000. Sole en 1984 la brutoj plimultiĝis je 1 110 000, t.e. 32,4%, kompare kun tiuj en 1983. En la loko ĉiu loĝanto meznombro posedas 38.43 brutojn kaj eĉ pli ol 90 brutojn en iuj gubernioj.

Kun la plimultiĝo de brutoj, rapide disvolviĝis ankaŭ la prilaborado de brutajoj. En 1984 la jara produktokvanto de la lano de tibetaj ŝafoj atingis 4 300 tunojn, tiu de ŝafviando — 27 550 tunojn, tiu de butero — 2 000 tunojn kaj tiu de feloj — 1 400 000 pecojn. Multe kreskis ankaŭ la produktokvantoj de vegetala vermo (*Cordyceps sinensis*), fritilario (*Fritillaria thunbergii*), juna cervokorno, mosko kaj



Parto de paŝtejo



Jurtoj sur stepo



*Kultura vivo de paŝtistoj*

aliaj valoraj drogoj kaj lokaj produktajoj.

En 1984 la nord-tibeta paŝtregiono ekpraktikis la principon stabilan dum longa tempo, nome "brutoj apartenas al paŝtinto". Dank' al la nova principo multe aktiviĝis la vasta paŝtistaro en la konstruado de la stepo, brutobredado kaj strebado al pli frua riĉiĝo. Tie oni ĉirkaŭigis gresejojn per palisaroj kun totala longo de pli ol 2 milionoj da metroj kaj plantis 4 000 hektarojn da diversaspecaj paŝtherboj. Nun la paŝtistoj fariĝis tre konsciencaj en herbokulturado.

Plivigliĝo de brutobredado akcelis aliajn aferojn. Nun tie jam aperis centoj da loĝadejoj kaj aro da paŝtistaj lernejoj. En iuj gubernioj oni komencis ekspluati vent-energiecon kaj sun-energiecon por elektroproduktado kaj varmigado.

Precipe menciinda estas la ŝanĝiĝo de Daĉjangtang, kiu antaŭe estis nomata "senhoma so-

vaĝejo" sur la nord-tibeta stepo. Nun la loko fariĝis "trezorejo". En la altega Daĉjangtang estas terure froste kaj ofte okazas inundoj, pro kio en la pasintaj multaj jaroj tie ne vivis homoj kaj neniu paŝtisto kuraĝis tien iri. Poste, en disvolviĝo de la konstruado de Tibeto, oni defiis la sovaĝejon. Nun tie paŝtas pli ol mil paŝtistoj, kiuj venkis diversajn malfacilojn kaj fariĝis la unuaj loĝantoj de la loko. Nun tie estas restoracio, hospitalo, ĉiovendejo, poŝtoŝtanco, banko kaj lernejo kaj krome tie aperis la unua vilaĝo, kie oni uzas elektron produktatan per venta energio.

Hodiaŭ ĉiu homo en Daĉjangtang meznombre posedas pli ol 100 brutojn kaj pokapa enspezo superis 600 jŭanojn (ĉ. 2.8 jŭanoj egalas al 1 usona dolaro). Por faciligi la trafikadon de la loko kaj oftigi la ekonomiajn kaj kulturajn kontaktojn inter Daĉjangtang kaj aliaj lokoj, iuj paŝ-

tistoj aĉetis aŭtojn por transportado. Ili decidis k.e.p. frue turni la "senhoman sovaĝejon" en vere riĉan lokon.

Nun la paŝtistoj en norda Tibeto fariĝis pli kaj pli bonhavaj. Prenu kiel ekzemplon Sŭonan Ciĝen, ordinaran paŝtiston en la urbeto Naĉju. En 1984 li establis butikon kaj aĉetis ŝarĝaŭton por okupiĝi pri longdistanca transportado. Tiujare lia butiko profitis 13 000 jŭanojn kaj lia kargotransportado donis al li 5 000 jŭanojn da profito. Nun lia familio havas abundajn grenon, buteron, viandon kaj aliajn ĉiutagajn bezonaĵojn. Krome li plasis en banko certan sumon da mono.

Samtempe kun la riĉiĝo de la tieaj paŝtistoj pli kaj pli vigliĝis la ekonomio de la urbeto Naĉju, la centra urbeto de la nord-tibeta stepo. Tie aparte alloga estas la foiro. En la sunlumo pli ol mil buntaj tendoj aspektis aparte bele, kvazaŭ buntaj floroj sur la verda stepo. Tie gajaj paŝtistoj trinkas sekal-vinon traktante negocon pri brutajoj, ĉiutagaj bezonaĵoj kaj produktaj materialoj alportitaj de ili per ĉevaloj, gruntoj, ĉaroj aŭ aŭtoj.

Tieaj paŝtistoj estas gastamaj. Ili afable invitas preterpasantojn venintajn de malproksime, eĉ ne konatajn, al sia hejmo por ke ili ĝuu kune kun ili la labor-fruktojn kaj ĝojon de la vivo. La mastroj regas gastojn per forte aroma buter-teo kaj graso ŝafaĵo. Ĝojaj de drinkado, ili eble kantas por gastoj kaj poste, se parolantaj, rakontas al gastoj pri la mizera pasinteco kaj la nuna feliĉo, pri sia espero por pli bela estonteco kaj pri sia amo al la stepo, kaj la gastoj certe ĝojiĝas pro la giganta ŝanĝiĝo de la stepo kaj sincere benas la estontecon de la gastigantoj.




## TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (6)

*Paŝtejo en mateno*




*Ĉeval-konkurso sur stepo*




*Artistoj en antikvaj kostumoj prezentas operon al paŝtistoj.*









*Sajaro sur stepo*



*Paštistino*




# Fosilia simi-homo antaŭ 200 000 jaroj

**L**A 2-an de oktobro 1984 regis bruado sur la monteto Ora Bovo de la gubernio Jingkoŭ en Ljaŭning-provinco de nordorienta Ĉinio: La loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo svarmis al la monteto, kiu estas 70 metrojn alta kaj simila al kuŝanta bovo, pro tio ke ĉinaj arkeologoj trovis en iu kaverno kranion de simi-homo, kiu estas pli kompleta ol tiu de pekina simi-homo.

Tiel frue kiel en la kvindekaj jaroj oni tie trovis fosiliajn mamulojn. En la jaroj de 1974 ĝis 1978 ĉinaj arkeologoj kvarfoje faris prifosadon tie kaj trovis pli ol 30 pecojn da ŝtonaj iloj faritaj de prahomoj; 76 specojn da fosiliaj mamuloj, kiaj dik-makzela cervo, sabro-denta tigro, mutaciinta lupo ktp; kaj plie, 11 klasojn da fosiliaj rampuloj kaj birdoj. Sume, oni trovis tie 87 specojn en ĉ. mil pecoj. Iuj ĉinaj arkeologoj opinias, ke la monteto Ora Bovo estas "la monteto Longgu de Ĝoŭkoŭdjan" de nordorienta Ĉinio kaj estas

trezorejo de subteraj fosilioj ankoraŭ ne konata.

La monteto Longgu de Ĝoŭkoŭdjan situas 48 km. sudokcidente de Pekino. En 1929 oni trovis tie kranion de pekina simi-homo, kiu vivis antaŭ 200 000-600 000 jaroj. La trovo donis praktikan atestaĵon al esploro pri ŝanĝo de simi-homo en homon. Ĝi estas rigardata kiel la plej grava arkeologia trovo de la mondo en la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento. Tamen, la fosilioj de pekina simi-homo estas nur kranioj, dentoj de malsamaj individuoj kaj malmultaj nekompletaj ostoj de membroj. Pro manko de materialoj multaj problemoj pri simi-homo restas enigmoj, kaj krome, la fosilioj de la kvin kranioj de pekinaj simi-homoj antaŭe trovitaj kaj aliaj materialoj pri simi-homo estis forprenitaj de usonanoj kaj malaperis sen spuro en 1941. La trovo de simi-homo en la monteto Ora Bovo prezentis



*La monteto Ora Bovo, kie oni trovis kranion de simi-homo*

novan kaj kompletan materialon al esploro pri trajtoj de la simi-homa korpo kaj la disvolviĝo de la homo.

La prifosadon gvidis vicprofesoro Lju Zun'e kaj asistanto Hŭang Junping de la Pekina Universitato, kun helpo de ses esplorantaj studentoj kaj lokaj arkeologoj. Vicprofesoro Lju trovis, ke la granda kaverno oriente de la monteto Ora Bovo estas tre simila al la monteto Longgu de Ĝoŭkoŭdjan, kaj ke oni probable trovos en ĝi fosiliojn de simi-homo. Sekve, li decidis prifosi la lokon. La fakto pruvis lian juĝon ĝusta. Malgraŭ sabla vento kaj humideco, ili kaŭriĝis sur la tero, zorgeme fosis tavolon post tavolo kaj serioze faris kribradon. Ili trovis fosiliajn patelojn, vertebrojn, ripojn, ulnojn, karpeojn, metakarpeojn, falangojn, koksostojn, piedfingrajn ostojn ktp de simi-homoj. Finfine ili trovis sur gluiĝinta ŝtonpeco fosilion de kompleta kranio kun supra makzelo. La prifosantoj kaj lokanoj treege ĝojis pri tio. La ĝojiga telegramo flugis al Pekino kaj sensaciis en la ĉina arkeologia rondo.


En la specimena ĉambro de la arkeologia fakultato de la Pekina Universitato mi intervjuis vicprofesoron Lju Zun'e, kiu tiam esploris la fosiliojn elfositajn en la monteto Ora Bovo. Li diris, ke oni neniam antaŭe vidis tiom kompletan kranion. La materialoj pri fosilioj de membraj ostoj de simi-homo estis netroveblaj antaŭe, krom tiu de koksosta fosilio malkovrita en orienta Afriko. La fosilioj de simi-homo elfositaj ĉi-foje venis de la sama individuo, kio faciligas studi pri simi-homo. La kompleta kranio faciligas studi pri la cerbo de simi-homo kaj pli precize restarigi la

vizaĝon de simi-homo. La simi-homo havis kompare kompletajn dentojn sur la supra makzelo, inter kiuj la incizivoj estis forte muelitaj, kio montras, ke la nutraĵo de la simi-homo estis tre kruda. Ĝia tria molaro estis juna, kio montras, ke ĝi estis plenkreska simi-homo kun pli ol 20 dentoj. Laŭ la trovitaj koksostoj oni konstatis, ke la simi-homo estis virseksa. Ĝi havis kompletajn vertebrojn, kiujn oni povas uzi por esplori la kurbiĝon de la vertebraro. La kompletaj ulnoj povas esti uzataj por esplori etendiĝon kaj kurbiĝon de la brakoj de simi-homo. Oni povas mezuri la formon de ĝia torako laŭ la trovitaj ripoj. En la kaverno oni trovis ankaŭ tri cindrejojn kun karbido. La bruligitaj ostopecoj kunmiksiĝis kun la cindroj, apud ili estis multe da dispecigitaj ostoj. Tio montris, ke la simi-homo en la monteto Ora Bovo sciis jam baki nutraĵon en fajro kaj dispecigi oston por elĉerpi el ĝi medolon. En la fosilioj de bestoj estas ankaŭ la fosilio de pekteno. Tio montris, ke siatempe apud la monteto fluis granda rivero. Krome, oni malkovris en la loko ankaŭ fosiliojn de sabro-denta tigro kaj dik-makzela cervo, sed la du bestoj jam malaperis antaŭ 200 000 jaroj, laŭ tio oni povas aserti, ke en la sama tempo vivis simi-homoj en la monteto Ora Bovo.

La prifosado en la monteto estas ankoraŭ en rudimento, la trovitaj simi-homaj kaj bestaj fosilioj estas ordigataj kaj multaj esploraj laboroj ankoraŭ ne estas komencitaj, sed tiu trovo estas jam alte taksita de la ĉinaj kaj alilandaj arkeologiaj rondoj. Estas antaŭvideble, ke en la monteto oni akiros pli gravan trovon en la estonteco.

### *Jen la malkovrita kranio de simi-homo*

*Ĉinaj arkeologoj elterigas fosilian simi-homon.*





# Raraj plantoj de Ĉinio

de ĜONG TU



Peonioj

ĈINIO estas unu el la landoj, kiuj posedas plej multajn speciojn de plantoj.

En Ĉinio videblas preskaŭ ĉiuj ĉefaj planto-specioj de la flaŭroj en la glacia, mezvarma kaj tropika zonoj de la norda hemisfero. Inter ili troviĝas pli ol 7 000 specioj de ksilemaj plantoj. En la mondo troviĝas pli ol 700 specioj de semaj plantoj, gimnospermoj, kiuj dividiĝas en 13 klasojn, kaj en Ĉinio estas pli ol 300 specioj de tiaj plantoj, kiuj dividiĝas en 12 klasojn. En Ĉinio kreskas pli ol 32 000 specioj de altklasaj plantoj.

La arbaroj dissemiĝas ĉefe en nordorienta kaj sudokcidenta Ĉinio, Fuĝjan-provinco kaj orienta Taj'ŭan-provinco de sudorienta Ĉinio. La Granda Ŝing'an-montaro de nordorienta Ĉinio estas la plej granda pinglarbara regiono kaj honorata kiel arbara trezorejo de Ĉinio, kie kreskas larikoj, betuloj kaj mongolaj pinoj (*Pinus sylvestris* var. *mongolica*). Ĉie en la varma Ŝjiŝŭang-banna de sudokcidenta Ĉinio kreskas kaŭĉukarboj, kinkonoj, oleaj palmoj, sisalaj agavoj kaj aliaj tropikaj ekonomiaj plantoj, kaj krome, tie produktiĝas ankaŭ kokosoj, bananoj, ananasoj, mangoj kaj aliaj tropikaj fruktoj.

La nombro de aleŭritoj, lakarboj, kamforarboj kaj bambuoj de

Ĉinio uzataj kiel industriaj materialoj okupas la unuan lokon en la mondo. En Ĉinio kreskas nemalmultaj raraj drogplantoj. Li Ŝiĝen (1518-1593 p. K.) de Ming-dinastio konigis 1 892 speciojn de drogplantoj en sia farmakopeo "Ben Caŭ Gang Mu". La ginsengo de Ĉangbaj-montaro, kartamo de Tibeto, licio de Ningŝja, pseŭdo-ginsengo de la provincoj Junnan kaj Gujĝoŭ kaj aliaj estas raraj drogplantoj.

Estas tre multaj specioj de floroj. En la mondo troviĝas ĉirkaŭ 800 specioj de rododendroj, inter ili 650 specioj kreskas en Ĉinio. La peonio — la reĝo de la floroj, propra al Ĉinio, estas admirata pro sia rava ĉarmeco. La peonio estas ornama planto kaj ĝia radiko povas esti uzata kiel drogo. Heze-gubernio de Ŝandong-provinco de Ĉinio estas fama plantejo de peonioj, kie kreskas ĉ. 400 specioj de peonioj.


Jen ankoraŭ pluraj raraj plantoj de Ĉinio:

Metasekvojo (*Metasequoia gluptostoboides*) — "viva fosilio" estas arbo kun alteco de pli ol 35 metroj kaj dikeco de pli ol du metroj. Ĝi estas bela kaj havas densajn branĉojn kaj foliojn, kies koloro varias laŭ sezonoj: printempe helverda, somere verda, aŭtune flava kaj vintre ruĝa kaj estas difinita kiel unu el la

antikvaj raraj arboj de la mondo. Metasekvojo prosperis ĉie en orienta Azio, norda Ameriko kaj Eŭropo en la frua kretaceo de la mezozoiko antaŭ cent milionoj da jaroj kaj pereis en la kvaternara glaci-rivera periodo. Kaj poste oni povis vidi nur ĝiajn fosiliojn. En 1941 oni trovis ĉ. mil metasekvojojn en la lim-regiono de la provincoj Hubej kaj Siĉŭan de Ĉinio, kio fariĝis grava eltrovo de la botanikistaj rondoj en la 20-a jarcento. Pro tio ĝi ricevis la nomon viva fosilio. La arbo kreskas rapide, estas bonkvalita materialo por konstruado kaj ankaŭ bona arbo-specio por medibeligo kaj arbarizo.

La kolomba arbo estas mondfama ornama arbo-specio. Ĝi havas groteskajn kaj belajn florojn, kiuj aspektas kiel kolomboj sidantaj sur ĝi. Tial oni donis al ĝi la nomon kolomba arbo. La kolomba arbo iam pereis en aliaj mondpartoj kaj nun kreskas nur en Ĉinio, tial ĝi estas aparte rara.

Ankaŭ la ginko estas antikva arbo-specio. Ĝi dividiĝas en femalan kaj masklan speciojn kaj ĝia frukta karno povas esti manĝata kaj uzata kiel drogo. Ĝia ligno havas densajn vejnojn kaj povas esti uzata por gravurado. En Ĝjuŝjan-gubernio de Ŝandong-provinco kreskas 3 000-




*Ginko, kiu kreskas sur la monto Ŭang'u en Henan-provinco, altas 37.5 metrojn kun trunka periferio de 9.1 metroj.*



*Cefalotakso (Cephalotaxus fortunei), kontraŭkancera planto kulturata en Tongĝjang-gubernio, Siĉŭan-provinco*

jara ginko kun ventumil-formaj folioj, 25.4 metrojn alta kaj ombanta proksimume 0.07 hektaron. Ok homoj apenaŭ povas brakumi ĝian trunkon mano en mano. Aŭtune kun densaj oraj folioj ĝi estas vere rara!

Kataĵo (*Cathaya argyrophylla*), kiel ekstreme rara arbo-specio de la mondo, estas alta ĉiamverda arbo de pinacoj. Ĝiaj folioj similas al tiuj de metasekvoĵo kaj havas po du arĝentajn vejnojn sur la dorsflanko. Ili brilas arĝente en delikata vento. Ĝia ligno estas



*La unua metasekvoĵo, kiun oni trovis ĉe Modaŭŝji en Hubej-provinco, Ĉinio*

bonkvalita materialo por konstrui ŝipojn, domojn kaj meblojn. La kataĵoj en la aliaj partoj de la mondo jam fariĝis subteraj fosilioj, kaj nun ili kreskas nur en la sudokcidenta parto de Ĉinio pro ĝia kompleksa topografio, kie dum la glaci-rivera periodo la altaj montoj protektis la plantojn kontraŭ la atako de la glaci-riveroj, kaj plie, la plantojn en la rivervaloj karesas la varmeta kaj humida musono. Oni nomas tiun raran arbo-specion postvivanto post la glaci-rivera periodo. En la kvindekaj jaroj ĉinaj sciencistoj trovis kataĵojn en Gŭangŝji kaj Siĉŭan, kio faris sensacion en la internaciaj biologaj rondoj kaj

liveris valorajn materialojn al evoluismo pri altklasaj plantoj kaj esploro de paleontologio, antikvaj klimato, geografio kaj geologio.

Por protekti tiujn rarajn arbojn kaj bestojn vivantajn en la arbaroj, de 1956 ĝis 1980 Ĉinio difinis 72 rezervejojn kun totala areo de pli ol 1 700 000 hektaroj en 22 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Inter ili nemalmultaj estis jam difinitaj kiel ĉefaj rezervejoj de Ĉinio kaj, iuj estis prenitaj kiel internaciaj sciencesploraj bazoj kaj apartenas al la protekta reto de la Sferoj de Homoj kaj Vivaĵoj.



## Kiel Opinias Niaj Legantoj

Mi tre kore dankas al Vi pro la belega kalendaro, kiun mi ĵus ricevis de Via Redakcio, antaŭ kelkaj tagoj, kaj kiu jam ornamas mian loĝejon. Ĉiuj miaj gekonataj kaj amikoj envias mian konatiĝon kun Vi, kaj kelkaj komencis jam lerni Esperanton.

Mi volas ankoraŭ foje tre afable danki al Vi pro la 12 numeroj de Via Revuo, senditaj al mi dum la pasinta jaro. Dank' al ili mi povis konatiĝi kun nuntempa vivo de la ĉina popolo kaj perfektigi mian lingvoscipovon. Mi volas sciigi Vin, ke mi jam abonis EPĈ por la 1985-a jaro. Mi volas elmeti al Via Redakcio ankoraŭ unu peton. Mi petas Vin, estu afable skribi artikolon pri ĉina kalendaro, certe ĝi estas tre interesa temo.

**CZESLAW OLICHWER**  
(Pollando)

(Ni kore dankas al s-ro C. Olichwer pro la laŭdo al niaj kalendaro kaj revuo. Ni publikigis en EPĈ n-ro 10 de 1983 artikolon pri la ĉina tradicia kalendaro. Ni jam sendis al li la kopiaĵon de tiu ĉi artikolo, esperante ke ĝi bonorde atingos lin. — La Red.)

La Esperanto-movado povas fieri pri tia prestiĝa, bele prezentita, enhavoriĉa kaj regule aperanta revuo. Mi ĉiam montras ĝin okaze de miaj prelegoj.

**EDWARD SYMOENS** (Belgio)

Laŭ mia memoro estis mia lasta aŭ antaŭlasta letero, en kiu mi menciis, ke la nigraj-blankaj fotoj laŭ mia opinio ne estas tre bonaj kaj klaraj. Ecepton faris kelkaj el ili, kiuj estis presitaj sur papero de alta kvalito. Jam en la n-ro 9

mi povis konstati, ke la nigraj-blankaj bildoj estis tre klaraj. Kun granda ĝojo mi nun povis konstati, ke en la n-ro 10 ĉiuj nigraj-blankaj bildoj estis tre, tre bone kaj klare presitaj. Mi deziras gratuli kaj samtempe danki vin pro via rapida reago.

Hodiaŭ venis la unua n-ro de 1985 de la revuo EPĈ. Tuj mi trafolumis ĝin kaj vidis, ke vi ekipis ĝin per tre multe da fotoj kaj multkoloraj bildoj, el kiuj kelkaj estis iomete tro malhelaj koncerne de kelkaj detaloj. Sed mi ne volas kritiki. Certe vi plue eksperimentos koncerne la plej taŭgan paperon por viaj celoj. Tion vi ja ankaŭ skribis en via saluto okaze de la jam komenciĝinta nova jaro 1985.

Kun tre granda intereso mi jam legis la raportojn pri la ekonomia reformo. Mi kredas, ke vi fakte estas nun sur la ĝusta vojo. Ĵus post kiam mi estis leginta tiujn artikolojn, nia televido sendis grandan kaj longdaŭran raporton pri la evoluo de via granda lando ekde imperiestraj tempoj ĝis hodiaŭ. La tre instrua raporto estis bele ilustrita per bildoj kaj precipe filmoj el diversaj regionoj de Ĉinio.  
**JOSEF FISCHER** (FR Germanio)

Post kelktempa interrompo mi reabonis vian ŝatatan revuon "El Popola Ĉinio". Tre interesis min la paĝo "Por Via Sano" de s-ro Sun Ŭejljang kaj ankaŭ tiu de s-ro Ŭang Joŭĵen en la lasta numero.

Miaj sugestoj:

1, Oni nepre klopodu facilkompreneble kaj detale skribi kaj kun taŭgaj bildoj klarigi, ĉar nur ĝusta

aplikado de la masaĝoj promesas efikon. La bildoj kiuj koncernas la masaĝon de la oreloj kaj okuloj ne estas multe instruigaj.

2, Multvalora por ĉiu esperantisto kiu interesiĝas por la saneco estus bona libro de masaĝo. Bonege estus, se la ĉina Esperanto-Ligo kolektas ĉiujn artikolojn pri tiu temo kiuj aperis kaj aperos, kaj post refoja tralaboro eldonos ilin en libroformo. Kiel mi jam skribis, necesas facila skribmaniero, taŭgaj bildoj kaj nepre ĉapitreto en kiu la fakvortoj estas bone klarigitaj. Bone estus ankaŭ inter krampoj skribi la elparolon de eventualaj ĉinaj vortoj.

**WALTER KOBELT** (Svedio)

(La proponoj de s-ro W. Kobelt estas bonegaj, precipe tiu pri la adaptado de artikoloj sur la paĝoj "Por Via Sano" al libro. Ni klopodos por efektivi la saĝan sugeston. — La Red.)

Ni intencas partopreni la U.K. en 1986 en Pekino kaj mi esperas, ke ĉiuj kongresanoj havos la eblecon rekte konversacii kun lokaj esperantistoj. Do estas tre interese ekscii novaĵojn pri la ĉina E-movado ĉefe rilate la venontan U.K. en Pekino.

**SFARDINI CARLA** (Italio)

Mi proponas al vi aperigi: a) artikolojn pri psikologio; b) sekcion "El leteroj de niaj legantoj"; c) artikolojn pri Latin-Ameriko kaj ĝenerale pri la tria mondo; kaj informojn pri la Esperanto-movado en ĉi tiuj landoj. Se estus eble, bonvolu aperigi artikolojn el kunlaborantoj de la tria mondo pri siaj landoj aŭ aliaj temoj.

**JAIME CALERO P.** (Kolombio)

Kvankam ankaŭ priesperantaj artikoloj estas bonvenaj kaj legindaj, tamen la revuo ne fariĝu nur rilate al Esperanto. Mi esperas, ke ĝi restu tia kia ĝi estas nun kun diversaj temoj kaj multaj fotoj.

**JANKO ŠTRUC** (Jugoslavio)

## Protekto de oreloj, nazo, okuloj kaj lipoj per masaĝo

de PAN ŜIGONG

La masaĝo estas taŭga por maljunuloj kaj mezaĝuloj. Longtempa persistado povas prokrasti la kadukiĝon de tiuj organoj kaj sentigi al la farantoj juniĝon.

### MASAĜO DE LA ORELOJ

1. Rekte etendi la montrajn fingrojn, meti ilin sur la tragojn kaj masaĝi 64-foje inter ĉi tiuj kaj la orelaj loboj de supre malsupren kaj inverse (Bildo 1).

2. Meti la montrajn fingrojn sur la mastoidojn kaj masaĝi ĉi tiujn 64-foje supre malsupren kaj inverse (Bildo 2).

3. Meti la montrajn fingrojn sur la *erĝu*-ojn (lokoj, kiuj kavi-

ĝas dum buŝmalfermiĝo) ĉe la tragoj kaj turni la fingrojn 64-foje (Bildo 3).

La ofta masaĝo povas akriĝi la aŭdadon kaj preventi maljunulan surdiĝon.

### MASAĜO DE LA NAZO

1. Meti la montrajn fingrojn sur la flankojn de la nazo kaj masaĝi 64-foje inter la akupunkturaj punktoj *ĝingming* kaj *jing-ŝjang* de supre malsupren kaj inverse (Bildo 4).

2. Kapti la nazlobojn per fingroj dika kaj montra kaj intermite premi ilin 64-foje (Bildo 5).

La ofta masaĝo povas preventi malvarmumon kaj redukti nazajn ŝtopiĝon kaj mukaĵon kaj havas certan kuracefikon sur kronikajn nazajn malsanojn.

### MASAĜO DE LA OKULOJ

1. Rekte etendi la montrajn fingrojn, horizontale meti ilin supren de la okuloj kaj masaĝi 64-foje horizontale de la internaj okulanguloj ĝis la eksteraj (Bildo 6).

2. Horizontale meti la montrajn fingrojn malsupren de la okuloj kaj masaĝi 64-foje horizontale de la internaj okulanguloj ĝis la eksteraj (Bildo 7).




1



2



3



4



5



6



7



8



9





10



11

La ofta masaĝo povas plibonigi la vidadon kaj preventi larmadon en la vento kaj okulsekiĝon.

### MASAĜO DE LA LIPOJ

1. Rekte etendi la montrajn fingrojn, horizontale meti ilin supren de la supra lipo kaj masaĝi ĝin 64-foje de la filtrumo ĝis la buŝanguloj (Bildo 9).

2. Meti la montrajn fingrojn sub la malsupran lipon kaj ma-

3. Meti la montrajn fingrojn sur la okulojn kaj cirkle masaĝi ilin 64-foje (Bildo 8).

saĝi ĝin de la mezo ambaŭflanken 64-foje (Bildo 10).

3. Meti la manplatojn sur la zigomojn kaj la dek fingrojn sur la frunton kaj cirkle masaĝi la zigomojn de interne eksteren 64 fojojn (Bildo 11).

La ofta masaĝo povas preventi kaj kuraci dentajn malsanojn kaj bone funkciigi la cerbon, lienon kaj stomakon.

# “Depresio” kaj “reprosperiĝo” de la Okcidenta Eŭropo

de ĜANG JUNLING

**D**EPRESIO de la Okcidenta Eŭropo estis pli kaj pli multe diskutata de la internacia publiko en la lastaj jaroj, kio ja ne estas senkaŭza, ĉar jam klare ŝanĝiĝis la pozicio de la Okcidenta Eŭropo en la nuna internacia ekonomia strukturo.

La rimarkinda ŝanĝiĝo de la monda ekonomio okazinta de la fino de la Dua Mondmilito ĝis la komenco de la sepdekaj jaroj manifestiĝis kiel jene: unue, iom-post-ioma malfortiĝo de la usona ekonomia hegemonio; due, rapida restariĝo kaj disvolviĝo de la ekonomio de la Okcidenta Eŭropo kaj trie, mirinda kresko de la japana ekonomio. Tio kaŭzis la situacion, ke kune ekzistas la ĉefaj ekonomiaj fortoj de Usono, Japanio kaj la Okcidenta Eŭropo.

Sed neatendite, la afero disvolviĝis poste en alia direkto, nome la ekonomio de la Okcidenta Eŭropo dronis en longa krizo. Tio videblis en la komenco de la sepdekaj jaroj kaj tre evidentiĝis post 1975. El la naŭ jaroj de 1975 ĝis 1983 la industria produktado de la Eŭropa Komunumo rimarkinde kreskis en nur du jaroj, kaj absolute malkreskis en kvar jaroj kaj tre malmulte leviĝis en la aliaj tri jaroj.

Kiel fariĝis tia la ekonomio de la Okcidenta

Eŭropo? Okcidentanoj opinias, ke ĝi renkontis “surprizan defion”, t. e. ili ne atendis unue, ke tiel malfacile restarigebla estas la tradicia industrio, due, ke tiel rapide progresas la nova tekniko, kaj trie, ke tiel furiozas la ekonomia atako de Usono kaj Japanio. Kvankam tio ne temas pri la kaŭzo de la depresio de la Okcidenta Eŭropo, tamen jam tuŝas ties seriozan ekonomian problemon.

En la komenco de la sepdekaj jaroj la ekonomio de la Okcidento (inkluzive de Japanio) travivis krizon montrantan novan direkton de la monda ekonomio. Post tio tuj ekagis Japanio. Ĝi rapide ellaboris politikon “prosperigi la landon per tekniko” kaj ne ŝparis fortojn por disvolvi novan kaj altan teknologion kun mikroelektroniko kiel la kerno. Usono ne faris paŝojn de difinita kaj centralizita reordigo kiel Japanio, sed poste rapidigis tiajn paŝojn. Kompare kun ili, la Okcidenta Eŭropo faris relative grandan eraron en la strategio de ekonomia disvolviĝo. Plejparto de la Okcident-Eŭropaj landoj bazis forigon de krizo kaj disvolvon de nacia ekonomio sur protekto kaj savo de tradicia industrio. Ĝuste kiel la prezidanto de la Itala Asocio de Dungantoj montris, ili ĉiam dediĉis sian energion al savado

de tiuj nerebonigeblaj ŝtal- kaj ŝip-industrioj kaj agrikulturo. Laŭ takso, en la 80-aj jaroj la Okcidenta Eŭropo donis kompanse pli ol 20 miliardojn da usonaj dolaroj al la ŝtala industrio. Dum multaj jaroj la Eŭropa Komunumo elspezis du trionojn de sia budĝeto por la agrikulturo, ĉefe por protekto de ĝia serioza superproduktado.

Krome, en la situacio de ŝanĝiĝo de tekniko kaj strukturo de la merkato, multaj kompanioj de la Okcidenta Eŭropo daŭre malaltigas la koston de tradiciaj produktaĵoj por defendi la malnovan merkaton, sed hezitas fari novajn produktaĵojn kaj krei novan merkaton.

Sekve en la disvolviĝo de industrio kun nova kaj alta teknologio la Okcidenta Eŭropo postĝis post Usono kaj Japanio. Depost la mezo de la sepdekaj jaroj Usono kaj Japanio daŭre metis grandan atenton sur studon kaj utiligon de nova teknologio, dume la Okcidenta Eŭropo ankoraŭ ne alprenis efektive efikajn paŝojn, tial ĝi atingis preskaŭ neniun grandan sukceson en tiu flanko. Ekzemple, la produktovaloro de duonkonduktantoj de kvar elektronikaj kompanioj, la plej grandaj en la Okcidenta Eŭropo, en 1978 konsistigis nur 2-3% de ilia vendovaloro en tiu jaro. Duonkonduktanto rigardata kiel "petrolo de la nova industria revolucio" estas branĉo tiel malforta en la Okcidenta Eŭropo kaj certe malhelpas la disvolviĝon de la tuta nova teknologio kaj eĉ la kreskon de la tuta nacia ekonomio.

Klare, la malleviĝo de la ekonomia pozicio de la Okcidenta Eŭropo estas nekontestebla fakto. Sed oni vaste diskutas, ĉu ĝi estas portempa fenomeno aŭ daŭra tendenco. Iu montris en "Novaĵ-semajno" de Usono, ke la Okcidenta Eŭropo, fieriga parto de kontinento, nun fariĝis politike malforta kun stagnanta ekonomio. La aŭtoritato en scienco kaj tekniko kaj komerca inteligenteco jam transiris al Japanio kaj Usono kaj eble ĉiam restos en ili. Kompreneble tio reprezentas opinion de unu flanko. Malsamopinias multaj aliaj. Iu artikolo en "Esploro de Komuna Merkato" montris, ke ne estas neigebla la depresio de la landoj de la Eŭropa Komunumo, sed povas burĝoni esperiga nova vivo en Eŭropo.

Ni devas diri, ke la unua opinio, tre pesimisma, troigas la malfacilojn alfrontatajn de la Okcidenta Eŭropo, kaj la dua iom objektive montris la nunan staton de la Okcidenta Eŭropo kaj ties latentan esperon. La Okcidenta Eŭropo, antaŭ ĉio, havas relative solidan bazon ĉu en tekniko, ĉu en

kulturo. Due, la sukcesoj de la Okcidenta Eŭropo en biotekniko, termonuklea fuzio, aviado kaj spacokomunikado estas neniom malpli grandaj ol tiuj de Usono, Japanio kaj aliaj landoj, kaj en iuj kampoj ĝi estas eĉ avangarda en la mondo. Kvankam iuj grandaj internacie famaj kompanioj de la Okcidenta Eŭropo malfrue ekpaŝis por ekspluati novan teknologion, tamen ili havas potencon ekonomian forton. Se ili faras konvenan dispozicion, ilia disvolviĝo estos netaksebla.

Estas menciinde precipe, ke en la lastaj du jaroj jam ekagis la Okcident-Eŭropaj landoj. Iliaj registaraj personuloj, sciencistoj kaj entreprenistoj analizis el malsamaj anguloj la nunan staton de la Okcidenta Eŭropo, antaŭvidis ĝian estontecon kaj esprimis la volon de la Okcidenta Eŭropo venki la depresion. La franca prezidanto F. Mitterrand montris, ke la estonteco de Francio estas nedisigebla de moderniĝo. Iu ministro de FR Germanio emfazis, ke ili devas preni alian vojon. La Eŭropa Komunumo substrekis en sia plano, ke Eŭropo ne devas nur rigardi apude.

Nun la Okcident-Eŭropaj landoj jam efektivas sian volon. Ili alprenis multflankajn efikajn rimedojn, el kiuj la ĉefaj estas: 1) intensigi ellaboron de plano por studi kaj utiligi novan teknologion kaj multe subteni la disvolviĝon de industrio kun nova teknologio. Multaj landoj jam ellaboris konkretajn rimedojn de favorata imposto, subvencio k.a. 2) la kompanioj ŝanĝas sian entreprenan strategion por pli rapide turni pli da fakoj al industrio kun alta teknologio. Plejparto de tiuj kompanioj, kiuj fabrikis elektraĵojn kaj elektronikajn produktaĵojn, nun okupiĝas ĉefe pri produktado de integritaj cirkvitoj, komputeroj k.s. 3) pliiĝi ligiĝon kaj kunlaboron, inkluzive tut-eŭropan kunlaboron organizitan de la Eŭropa Komunumo pri spacotekniko kaj tekniko de termonuklea fuzio, kuman konstruadon organizitan de diversaj registaroj kaj kunlaboron inter iuj kompanioj. La Okcidenta Eŭropo jam efektivigis kaj nun preparas serion da gravaj ekonomiaj paŝoj, kiujn iuj personoj rigardas kiel signon de reprosperiĝo de Eŭropo.

Sed la supraj rimedoj de la Okcidenta Eŭropo kaj ĝiaj jam akiritaj sukcesoj estas nur komenco. Kompare kun Usono kaj Japanio, la Okcidenta Eŭropo malfacile povas en mallonga tempo ŝanĝi sian malfavoran pozicion en la internacia ekonomia strukturo. Oni povas aserti, ke por tio ĝi ankoraŭ devas trairi tre malfacilan vojon.



# Ĉinaj Kamparanaj Geedzoj Vizitis Francion

de LIŬ ĜENG

**P**ASINTJARE mi vizitis la vilaĝon Daĉiuĝuang en Ĝinghaj-gubernio de la municipo Tjanĝin kaj verkis la artikolon "Ŝanĝiĝo de Daĉiuĝuang" (vd. la dekan numeron de EPC, 1984). En la artikolo mi rakontis pri mia intervjuo al kamparano Ma Deljang. Li diris al mi, ke li neniam eliris el la provinco Hebej dum sia vivo de pli ol kvardek jaroj (Tjanĝin estas en la provinco Hebej), kaj lia edzino kun aĝo de pli ol tridek jaroj eĉ neniam eliris el Tjanĝin. Sed neatendite, nelonge post mia reveno al Pekino la geedzoj vizitis Parizon kaj nordan kamparon de Francio dum pli ol dek tagoj en 1984, kiel gastoj de la Unua Televidostacio de Francio.

*La franca agrikultura ministro Michel Rocard manpremas Ma Deljang, doninte al li la kavaliran ordenon.*



*Ma Deljang kaj lia edzino en tritikkampoj*

Tio okazis jene: En la fino de septembro de 1984, kiam Ma

Deljang laboris en sia kampo, raportistoj de la Unua Televidostacio de Francio kiuj venis en la vilaĝon por filmi aktualaĵojn, intervjuis lin. Li prezentis al ili ŝanĝojn de sia hejmloko kaj diris, ke la enspezo de lia familio en ĉiu el la lastaj jaroj superis dek mil jŭanojn (unu dolaro egalas al 2.8 jŭanoj). Iu el la raportistoj demandis lin: "Por kio vi uzos tiel multe da mono?" Li respondis: "La kulturnivelo de ĉinaj kamparanoj estas malalta, mi devas pagi por studo de miaj infanoj en universitato." "Tio ne bezonos elspezigi tiel multe. Kion alian vi do volas fari?" demandis la raportisto. Ridetante Ma respondis: "Mi






Agrikultura meritatesto de kavalira ordeno subskribita de la franca agrikultura ministro Michel Rocard kaj donita al Ma Deljang

turo de Francio aranĝis por ni aliajn vizitojn. Mi ricevis du kuprajn medalojn kaj unu kavaliran ordenon kun rubando donacitajn de la ministro de agrikulturo kaj la prezidanto de la Asocio de Agrikulturo de Francio.”

Raportistino de la Unua Televidostacio de Francio faris televidan filmon pri la vivo de Ma Deljang kaj titolis ĝin per “Ĉinaj Kampanoj Riĉiĝas”. La filmo kaŭzis sensacion en Francio. Tial la geedzoj estis varme akceptataj dum sia vizito. La du plej fortaj agrikulturaj organizoj, la Ministrejo de Agrikulturo kaj la Asocio de Agrikulturo de Francio, aranĝis por ili la tagordon.

Kiam la geedzoj revenis el Francio, He Kang, ministro de la Ministrejo de Agrikulturo de Ĉinio bonvenigis ilin ĉe la flughaveno kaj donacis al ili la albumon “Ĉina Agrikulturo”. La ministro skribis sur ĝia unua paĝo la vortojn “ankoraŭ pli grandan sukceson al vi” por ilin kuraĝigi.

Agrikultura medalo (maldekstre), agrikultura kavalira ordeno (meze) kaj medalo de Olive de Serres, ricevitaj de Ma Deljang



volas viziti diversajn lokojn de la mondo, ekz. Parizon, Novjorkon, Londonon, Tokion. . .” La raportistoj miris, ke ĉina kampano scias tiel multe da eksterlandaj urboj. La penso de tiu ĉina kampano profunde impresis la francajn raportistojn. Ilia filmo pri la ekonomia disvolviĝo kaj ŝanĝoj de la vilaĝo Daĉiŭĝuang prezentiĝis en Francio kaj multe interesis francajn rigardantojn, ke la Unua Televidostacio de Francio ilin invitis al sia lando. Antaŭ sia enaviadiliĝo, Ma Deljang diris al raportistoj: “Mi kore dankas la francojn pro la varma invito. Mi kunportos la amikecon de la ĉina popolo al la franca popolo kaj lernos de francaj kampanoj ilian avangardan sperton en mastrumado.”

“Kiujn lokojn vi vizitis en Francio?” multaj lin demandis post lia reveno el Francio.

“Ĉefe ni vizitis kultivejojn kaj paŝtejojn. La Unua Televidostacio kaj la Ministrejo de Agrikul-

Vilaĝanoj de Daĉiŭĝuang kunvenas por honori la geedzojn Ma Deljang post ilia reveno de Francio.





# La kreinto de argilaj homfiguroj animitaj

de ŬEJ LJAŬ

**J**AM pasis pli ol 20 jaroj, de kiam ŝi devis resti en la kvietega medio pro sia malsana korpo.

En la pli ol 20 jaroj ŝi jam al kutimiĝis meditati ĉe la fenestro. Ĉu neĝo sur la branĉoj ekster la fenestro, ĉu burĝono sur la arbotrunko faligita de peza neĝo, ĉu la strangaj vejnoj de la planko el arta marmoro de la kuirejo, ĉio povis konduki ŝin en ĝojan imagon.

En la pli ol 20 jaroj la beleco, kiun ŝi perceptis en sia malvasta vivmedio, senĉese fluis en ŝian koron kaj de tie fluis en argilajn bulojn en ŝiaj manoj. Jen vigliĝis la buloj! Ili ĉirkaŭis ŝin, dancis, kantis, flustris, meditis. . . La malgrandaj vivaĵoj alportis al ŝi grandan konsolon.

En la pli ol 20 jaroj preskaŭ neniuj sciis ŝian nomon. Kaj en la loĝkvartalo de la universitato Ĉinghŭa, kie ŝi vivas, tre malmultaj sciis ŝian nomon.

En la pli ol 20 jaroj ŝi kviete vivis en sia propra mondo, senlace serĉadis belecon, malgraŭ la kruela turmentado de malsanoj.

Ŝi nomiĝas Ĝang Junzi.

Iun tagon de la lasta somero, oficistoj de la Centra Televidostacio de Ĉinio longe serĉadis ŝin en la universitato Ĉinghŭa kaj fine trovis ŝin en tre ordinara apartamento. De tiam ŝi kaj ŝiaj

argilaj homfiguroj eliris el sia propra mondo kaj estis konataj de la socio.

Inter ŝiaj argilaj homfiguroj oni vidas virtan kaj firmvolan Jane Eyre, sveltan virinon plukantan morusfoliojn, flugantan feinon, senĝenan budhon de Dunhŭang. . . La tro misformita plastiko, fluecaj linioj, helaj koloroj, ĉiuj donis al la argila skulpturo novan guston.

Ŝiaj argilaj skulptaĵoj sensaciis ĉe rigardantoj. Vidinte ŝian "Jane Eyre", iu kompetentulo de belarta rondo admiris: "La argilaĵo skizis la tutan romanon!"

Iuj scivolemaj studentoj ne volontis rekoni ŝian talenton. Sed kiam ili venis al ŝia hejmo kaj vidis ŝiajn skulptaĵojn, ili ĉiuj estis mirigitaj de ŝiaj kreaĵoj kaj fariĝis ŝiaj bonaj amikoj. Iu el ili diris: "Onjo Ĝang ne scias pri la tridimensia spaco, sed ŝia skulptaĵo 'Oginsama' (princino Gin, heroino en japana filmo 'Oginsama') sufiĉe lerte esprimas la tridimensian spacon. Onjo Ĝang havas instinktan kaj tre precizan perceptadon de la beleco."

Antaŭ nelonge mezaĝa viro en drapa palto venis konsulti ŝin. Post rigardo de ŝiaj skulptaĵoj li longe ĉagreniĝis. Li sincere konsultis ŝin kun demando: "Ni ambaŭ skulptis homfigurojn de filmo kaj teatro, sed kial mi elmon-



*Ĝang Junzi denove okupiĝas pri argilaj homfiguroj*

tris nur ilian eksteraĵon, kaj vi povis animi ilin?"

Vidante lin, ŝi diris en kvieto: "Vi estas pli sana kaj pli juna ol mi. Se vi elspezos pli da tempo por legi pli multe, se vi bone altigos vian artnivelon kaj estos libera de mon-allogo, se vi ne faros grandan kvanton da senvaloraĵoj, vi certe superos min." Vidante ŝian palan kaj marasman vizaĝon, kaj ŝiajn eroditan vatveston kaj elmodiĝintajn ŝuojn, la viro montris iom da honto: "Instruistino Ĝang, mi ne povas ellerni vian arton."

Vere malfacila estis la vojo irita de Ĝang Junzi.

Antaŭ pli ol 20 jaroj la sorto surprize atakis ŝin: Ŝiaj internaĵoj estis infektitaj de tuberkulozo. La kuracistoj fariĝis senpovaj kontraŭ ŝia malsano kaj asertis, ke ŝi devas ĉiam kuŝi en lito. Ŝi, juna, svelta, ĵus diplomita el flegistina lernejo, antaŭ ol komenci sian profesion servon, fariĝis grava malsanulo kaj bezonis alies flegadon.

Ŝi kuŝis en lito 5 sinsekvajn jarojn.

Ho, 5 jaroj! Kiel longa kaj sufoka tempodaŭro por homo. Tiel longa tempo estas sufiĉa por detrui la volon de sana homo kaj ĵeti lin en senliman mallumon.

Tamen ŝi ne deprimiĝis en la 5 jaroj, sed male, forlasis la liton.



*Gang Junzi kaj ŝiaj edzo kaj filino*

Ŝin kuracis ne medikamentoj, sed sennombraj ĉinaj kaj alilandaj literaturaj verkoj. Ŝi plurfoje legis ĉinan klasikan romanon «*Songô de Ruĝa Buduaro*», «*Anna Karenina*», «*Jane Eyre*» ktp. Ŝia sentema koro estis emociita de la vivo priskribita en la verkoj. Ŝia artismo estis vekita iom post iom. Tiam, kvankam malsana, ŝi estis plena de patoso, sed ŝi ne trovis rimedon por esprimi.

Iun vesperon antaŭ 20 jaroj, ŝia 4-jara filineto revenis de infanĝardeno, kun poŝoj pufigitaj per du buloj da malpura argilo. Ŝi volus tuj forĵeti ilin, sed la filineto kriis al sia patrino, ke la lasta faru por ŝi globetojn el la argilo. Ŝi do faris por ŝi unue du globetojn, poste pandon distriĝantan per pilko. La filineto ekdancis de ĝojo. Ĝang Junzi ne atendis, ke en la du buloj da argilo, kiujn ŝi volis forĵeti, ŝi trovis la plej taŭgan rimedon esprimi sian senton. De tiam komenciĝis ŝia argila modlado.

Vivado de artistoj estas peniga. Sendube, ŝia elekto de la okupo per si mem deklaris, ke ŝi devas morte batali kontraŭ la malsano dum sia tuta vivo.

Ŝia edzo, kiu edziĝis al ŝi en ŝia malfeliĉo, tre zorgas pri ŝia

kreskado en arto, same kiel pri ŝia malsano. Li estas vicprofesoro de la fakultato de precizaj aparatoj en Ĉinghŭa-universitato. Kvankam ne multescia pri arto, li tamen ĉiam restas sincera subteni sian edzinon. Ĉiufoje, kiam li ricevas katalogojn de novaj libroj, li tuj donas al sia edzino, por ke ŝi substreku la deziratajn librojn, kaj poste li havigas ilin al ŝi malgraŭ diversaj malfaciloj. Se oni prezentas filmon aŭ teatraĵon en la universitato, li klopodas akiri biletojn kaj akompanas ŝin en aprecado.

Pro serioza malforteco ŝi apenaŭ eliras el sia hejmo. Tamen, se en la belarta ekspoziciejo okazas interesa ekspozicio, ŝi neniam preterlasas la ŝancon. En ĝi ŝi povas rigardi starante nur unu horon, poste ŝia edzo aŭ filino devas ŝin kuŝigi sur benko ekster la ekspozicia halo. Tie ŝi devas ripozi duonhoron kaj poste reiri en la ekspozicion. Ĉiu vizito al belarta ekspozicio serioze malfortigas ŝin.


La tereno de ŝia agado estas tre mallarĝa. Doloro, longa kuŝado kaj skulptado preskaŭ fariĝis la tuta enhavo de ŝia vivo. La temo de ŝia skulptado venas el filmo, televido, scenejo kaj li-

teratura verko. Ŝi skizas ĉiun teatraĵon, kiun ŝi spektas. Ŝi firme kaptas gracian plastikan pozon mallonge daŭranta, kaj poste longe pripensas kaj preparas sin por skulpti. Ŝia modlado estas doloriga. Ĉiu argila homfiguro okupas al ŝi almenaŭ unu semajnon. Dum la semajno ŝi devas suferi teruran doloron ĉe la koro kaj abdomeno. Dum la modlado forte batas la koro, tremas la manoj. Kiam finiĝas ŝia modlado, ŝia forto estas preskaŭ elĉerpita, kaj ŝi devas kuŝi tutan semajnon en lito por havigi al si freŝan energion antaŭ ol doni ĝin al nova homfiguro. . .

Ĉu ŝi animis la malgrandajn argilajn homfigurojn aŭ la lastaj donis al ŝi la vivon en la pasintaj pli ol 20 jaroj? Oni ne povis klare distingi unu de la alia. Foje, kuracisto, kiun ŝi iam vizitis, vidis ŝin kaj ŝiajn argilajn homfigurojn en televido kaj ekkriis de miro: «*Ŝi ankoraŭ vivas! Kiajn belaĵojn ŝi kreis!*»

Ĝang Junzi, 56-jara, ĝuas la vivon kun plena memfido. Ŝi volas konigi sian sperton pri modlado en libro. Kaj cetere, ŝi intencas instrui kelkajn junulojn, se la sanstato permesos. Ŝi promesis restigi ion valoran al la mondo.






*Antikva ĉina danco*

*Altebenaĵa knabino*

*Knabino kun  
poto surkape*


*Dio de la floro*








*Amkanto  
Danco kun bivo*



*Feino*

*Jane Eyre*

*Tess de la  
D'Urbervilles*



*Kolektado de morusfolioj*

